



DUMONATA KULTURA INFORMILO KAJ ESPRIMILO

Redaktejo: Esperanto, Cargue Sac, F 47470 BEAUVILLE

Unu n-ro: 10 FF. Unujara abono: 60 FF ĝirotaj al:

CERCLE AMICAL ESP. AGENAIS, pĉk 3371 74 M Bordeaux

(mencii same sur bankĉekoj!)

Tel: 53.95.40.26

ĈIELPECETO

Estas ĝardeno kvazaŭ poemo,
 Tenera insuleto inter arba maro.
 Ĉi tie, la floroj en siaj puntaj roboj
 Delikate kliniĝas al strangformaj ŝtonoj.
 La sunradio trinketas kun raviĝo
 La etan rosguton en velura koloro.
 La malva verbeno la serpilon ĉarmas,
 Ametist' astero al sia stelo revas.
 Ĝojhelianto lumigas min ekstaze ;
 Per miraklo, mi estas lampo miavice.
 Ho, se mi povus amheliĝi la tutan mondon !

Subite la lazuro malfermiĝas,
 Kiel eksterordinara fenestrego,
 Sur l' horizonto mem de feliĉpromeso ;
 Kaj ĝojbirdo la ĉielon plenigas
 Per sia vivanta simbolo...

Michèle Freud



Tutaj informoj kaj petoj

NIKOLIN'

6-11. aŭgusto 1990

La muzika kulturo en Esperanto

Gvidos la seminarion Nicole Pairoux, belgino, ekslernejestro, kantistino konata sub la nomo **Nikolin'**. Esperanto estas interesa kaj unika kultur-lingvo ankaŭ pro siaj kantistoj kaj kanzonoj. Precipe ekde la sepdekaj jaroj, sed ankaŭ pli frue, muziko fariĝis grava dimensio de nia transnacia kulturo. **Nikolin'**, profesia kantistino el Belgio, akompanos vin en agrabla promonado tra tiu dimensio, ekde la unuaj versoj de **La Espero**, tra la kabareda talento de **Raymond Swartz** kaj **Mihaly Sárosi**, ĝis la "romaskolo" de Gianfranco Molle kaj la rok-ensembloj de la 80-aj jaroj. Ĉiutage finposttagmeze sub la gvidado de **Nikolin'** grupiĝos la kantemuloj el la diversaj kursoj por formi koruseton kaj por pretigi kant-vesperojn.

Konatiĝu kun **Nikolin'** : 1936 : Nicole Pairoux naskiĝas apud Namur en Belgio. 1983 : ŝi esperantistiĝas. 1984 : ŝi eldonas sian unuan diskon en esperanto : "**Haveno**" 45-turna (elĉerpita). 1987 : "**Invito al ĝojo**", kasedo eldonita en kunlaboro kun LF-Koop. 1988 : dua kasedo : "**Jula Lando Nikolin'**", LF-Koop. 1989 : 3-a kasedo : "**Nur per amo**", LF-Koop kaj 33-turna disko "**La esperanto-knabino**", LF-Koop; kaj "**Kiam Parizo estis Parizo ankaŭ por ni esperantistoj**", muzika vidbendo originala en esperanto, LF-Koop. Ekde 1987 **Nikolin'** rondiras en eŭropa esperantio : tra la landoj belga, dana, franca, germana, itala, hispana, fin-

na, nederlanda, svisa kaj sveda ktp.

Prezoj : Tuta aranĝo (kurso, manĝoj, tranoktado, organizitaj promenadoj, vesperoj ktp) kostas kun tranoktado en kvarlita ĉambro : SF 400, en dulita ĉambro : SF 440, en unulita ĉambro : SF 520. Tiuj prezoj validos, se la antaŭpago alvenos antaŭ la 6-a de julio. Se la antaŭpago alvenos poste, sed almenaŭ dek tagojn antaŭ la aranĝo, aldoniĝos SF 20 al la restadkosto. Se la antaŭpago alvenos dum la 10 lastaj tagoj antaŭ la aranĝo, aldoniĝos SF 50 al la restadkosto. Do, aliĝu kaj konfirmu vian aliĝon kiel eble plej frue!

La aliĝilo estas sendota al :
Kultura Centro Esperantista, Pf 779
CH-2301 LA CHAUX DE FONDS

Kiu volas korespondi kun ĉeĥoslovakaj esperantistoj, skribu al jena adreso!

Karel KRATOCHVÍL, Lidická 325
CS-473 01 NOVÝ BOR

Junulo Vadim Ĉajkin, P.K. 124,
Cjurupinsk-1, USSR-326520, dez. kor.
pri naturismo, orientaj batalartoj,
jogo, okultismo, filozofio, para-
sciencoj, NIFO-j kaj E-movado.
Interŝanĝus librojn, revuojn kaj
fotojn.

Laŭte! plimultekostas:
Bonvolu noti la denunan novan jar-
koston de la abono al **L!** : **60 FF**
Jarkotizo al AERA restos plu **20 FF**

ĈIES VOĈO

Denove pri "LA DANĜERA LINGVO"

Kiel kunaktoro en la drameca artikolo "Jes, Esperanto estis danĝera lingvo", aperinta en la n-ro 87 de **Laŭte**, marto-aprilo 1990, paĝojn 47-48-49, sub la plumo de K-do Petro JAYER, tra la peranteco de K-do E. DAZUN kaj L. LENTAIGNE, mi deziras alporti precizigojn, kiujn mi estus farinta, se oni estus informinta min pri tiu ĉi aperigo. Efektive temas pri tragediaj momentoj, kiujn mi parte travivis, kun mia ĉiam kara amiko Petro JAYER, en Vieno dum la jaroj 1943-44-45.

Dubasence redaktita, la 4a § de tiu ĉi artikolo povus supozigi, ke mi Rolando GRANDIERE, perforte sendita en Austrion, estis arestita de Gustav WEBER en Vieno, dum kunveno de vienaj esperantistoj, kie P. JAYER invitis min. Feliĉe por mi, mi ne povis ĝin ĉeesti pro diversaj motivoj, interalie pro aerbombardado de mia uzino kaj detruo de la tramo. Bedaŭrinde, dum tiu ĉi kunveno senatente alvenis la GESTAPO. Ni konas la sekvon : P. JAYER kaj G. WEBER deportitaj al mortkoncentrejo MAUTHAUSEN, murdo de G.W... La tuj sekvanta paragrafo tion precizigas... "La alia juna SAT-ano, kiu bonŝance eskapis la arestiĝon..."

Mi dezirus, ke la legantoj de tiu ĉi interesa artikolo ne supozu, ke mi samopinias kiel P.J. pri liaj kritikoj al la "historiistoj", pro tio ke "Multaj nenion travivis el tio, pri kio ili skribas". Laŭ mi senprava aserto kontraŭ Ulrich LINS kaj maljusta pritrakto de la ĉefverko "La Danĝera Lingvo".

Mi ne kontestas, ke la eventoj, kiuj koncernas G.W kaj P.J. estas nur mallonge kaj ne detale prirakontitaj, sed nenio, kio estas dirita, estas, laŭ mia memoro misprezentita.

Plene mi konfirmas kion mi mem skribis en la revuo SAT-AMIKARO, n-ro 449, januaro 1990, pri "La Danĝera Lingvo", aldonante ke tiu ĉi 546-paĝa honesta verko entenas tre dokumentitan studon kun multaj piednotoj kaj klarigaj referencoj pri la persekutoj kontraŭ esperanto... kaj esperantistoj, sen pretendo ĉion detale priskribi, kompreneble !

La legantoj, ĉefe la junaj, povas kompreni la ĉefrolon de SAT en la historio de esperanto.

Koncerne niajn ne banalajn travivaĵojn kun Petro, kiu mirakle elsaviĝis de mortkoncentrejo, ni ambaŭ povus verki simile ampleksan libron kiel "La D.L." kaj tamen ne ĉion detale pritrakti !

Verdire ni estis fervoraj, konyinkitaj, sennaciecaj SAT-aktivuloj, junaj kaj certe tro aŭdacaj kaj riskemaj por la periodo. Ni restis aktivaj SAT-anoj kaj praktikis sennacismon dum nia tuta vivo. Arde ni kontribuis al la diskonigo de la SAT-idealo. Ni kuraĝe luktis sub la regno de HITLER kaj same denunciis la metodojn de STALIN, kiam amaso de laboristoj lin kultis. Neniu herooĝo en tio. Nura, firma senkompromisa sinteno kaj normala respekto al tiuj, kiuj suferis aŭ pagis per propra vivo, sub totalismaj reĝimoj, por ke ni povu nun libere esprimiĝi.

GRATULOJN al Ulrich LINS pro lia majstra kontribuo al la historio de esperanto tra ĝiaj sennombraj persekutoj. SENKULPIGON al Petro JAYER, mia plej kara kamarado, pro tiu amikeca reĝustigo.

Rolando GRANDIERE

MALPLI ESTAS PLI !

(Koncernas L! 87, p.62. Ekologio : radikalaj elektoj farendaj)

Jen kvintesenco de ekologia politikado.

La centra mesaĝo de la ekologiaj sciencoj estas limigo kadre de la fundamentaj biologiaj reguloj en la biosfero. Fakte kaj vere : la konsumaj eksceso de la homa specio estas la kaŭzo de la sociekologia krizo. Kaj memlimigo

estas ankaŭ devenpunkto de preventiva konduto de la homo se temas pri esti parto kaj partnero de la naturo. Tiu ideo "Malpli estas pli!" estas precipa pensa kaj aga koncepto de la malgranda Ekologia-Demokratia Partio de FRG (ekzistas de 1980, kontaktadreso ĉe la aŭtoro).

J.M.Verger do ne pravas, dirante ke neniuj partio - inkluzive de la verdaj - faris la paŝon de medioprotektado al iu "ekologiisma pensmaniero". Veras ja, ke tiu ĵus menciita partio pro sia ĉi-koncerna fundamenteco ne estas aparte konata. Ĝi eĉ sur eŭropa nivelo estis kaj estas kontraŭbatalata de la ideologie maldekstraj DIE GRÜNEN (kiuj nun eĉ pensas pri kuniĝo kun la Partio de demokratia socialismo, posteulo de la eksa komunisma partio en GDR). Propradire ja estas hontindaĝo, ke nun, kiam la biosfera situacio tiom akre aĉiĝas, eĉ origine neekologie determinitaj organizaĵoj kaj homoj devas atentigi verdulojn pri ties precipa devo : re(tro)konduki la homan konscion al la gvida valoro de la vivo mem kiel maldisipe memreguliga sistemo.

W. Gunther, Schulstr.7, D-3501 Ahnatal 1, FRG.

RIMARKIGO pri L! de januaro, p.8/9.

En la lasta debatemmo, Patriko kontribuis per stranga rezonado. Ĝi metas demandon : "Kial li ellernis E-on ?!... Ĉu por doni plej trafan argumenton al la E-brem-santoj ?"

Suzanne

REGŬSTIGO DE TAJPERARO, KUN KOMENTOJ

Ĉar mian manskribon kapablas legi nur mia patrino, mi kutimas ĉiujn miajn tekstojn skribi per maŝino. Sed, ĉar mi ne estas tre lerta, mi lasas en miaj tekstoj multajn tajperarojn. Kribo regule ricevas tekstojn, en kiuj mi, malgraŭ zorga relegado, lasis tajperarojn. Li tiam reĝustigas (foje aldonante siajn proprajn tajperarojn!). Kiam la eraro estas tia, ke vorto ne estas klara, li

skribas tion, kio laŭ lia supozo estas la plej verŝajna teksto. Tamen, ĉar la mondkoncepto de Kribo ne kongruas 100-procente kun la mia, foje li malĝuste supozas. Ĝenerale mi ne korektas.

Tamen, en la lasta numero de L!, komence de mia respondo al kamarado Ledon, Kribo dirigas al mi : "plurfoje okazis, ke homoj, al kiuj mi klarigis, ke ili eraras pri SIA pensmaniero, poste fariĝis amikoj, kun kiuj mi plezure korespondas." Devus esti : ili eraras pri MIA pensmaniero.

Ke homo havas alian pensmanieron, ol la mian, tute ne pruvas, ke ili eraras, kaj mi ne kutimas (almenaŭ konscie) trudi al aliaj homoj mian pensmanieron. Kion miaj nervoj malfacile eltenas, tio estas, ke kelkaj homoj atribuas al mi pensojn, kiuj ne estas la miaj. Tiam mi reagis, kaj klarigas, ke la ideoj, kiujn ili kritikas, havas nenian rilaton kun tio, kion mi efektive pensas, kaj provas esprimi en miaj tekstoj. Mi bonvolas, ke oni kritiku miajn ideojn, sed ne, ke oni nomu "jakelinismaj ideoj" ideojn, kiujn mi neniam esprimis.

Mi profitas la okazon por klarigi, kion mi nomas "ateistoj". Mi distingas :

- la homojn, en kies mensa universo ne estas koncepto, por kiu ili bezonus la vorton "Dio". Tiujn homojn mi ne nomas ateistoj. Estas por mi malfacile kompreni la mensajn universojn de tiuj homoj. Sed mi scias, ke en la tempo de Dante neniu kristano povus imagi kristanan mondkoncepton sen la koncepto "diablo". Nu, mi kristano de la 20-a jarcento ja uzas la vorton Dio (sed kun alia difino, ol tiu, kiun donis al la vorto la raciistoj, kiuj verkis PIV), sed estas en mia menso neniu koncepto, por kiu mi bezonus la vorton "diablo". Do, same kiel Dante ne komprenus min, mi ne 100-procente komprenas la homojn, kiuj ne uzas la vorton "Dio". Sed mi ĝenerale ne havas problemojn kun ili. Mia kristana idealo ne estas, ke ĉiuj homoj fariĝu kristanoj, sed, ke ĉiuj homoj amu unu la alian. Laŭmezure, kiel la mondkoncepto de tiuj homoj ne kontraŭas tiun mian idealon, mi havas nenian motivon por kvereli kun ili. Ekzemple, mi neniam havis okazon kvereli kun mia amiko Kribo pro religia aŭ malreligia mondkoncepto.

- la homojn, kiuj kredas, ke Dio ne ekzistas. Nur tiujn mi nomas "ateistoj". Nu, por kredi, ke Dio ne ekzistas, necesas havi en sia menso iun koncepton, por kiu oni bezonas la vorton "Dio". La problemo estas, ke multaj ateistoj imagas, ke tio, kion ili nomas Dio, havas ege negativan rolon. Laŭmezure, kiel mi estas enmetita en ilia mondkoncepto, mi rajtas reagi, dirante, ke la rolon, kiun ili volas doni al mi, mi ne povas akcepti. Komprenoble, ateistoj rajtas esprimi sian penson, kaj komprenoble ili rajtas min kritiki. Sed nervozigas min, ke oni faras al mi kritikojn, kiuj havas nenion por fari kun tio, kion mi efektive pensas. Ĉar, kiel ĉiuj scias, mi estas nervoza persono, mi malbone eltenas, ke pro tio, ke mi uzas la vorton "Dio" kaj diras min kristano, oni konfuzas min kun karikaturoj, kiujn ateistoj inventis por la bezonoj de sia propra propagando. Se oni volas min pendigi, almenaŭ pro miaj krimoj, ne pro tiuj de aliaj homoj, nek pro nur imagitaj krimoj !

Do, mi nenian provas persvadi pri la erareco de lia mondkoncepto. Kiel poligloto mi scias, ke estas pluraj manieroj vidi la realon (tial mi tiel akre reagis al lantiismo). Sed mi malbone eltenas, ke oni eraras pri MIA mondkoncepto, t.e. ke oni volas forpeli min el laborista asocio pro ateistaj karikaturoj, kiuj havas nenion por fari kun tio, kion mi reale pensas (pri tio mi certas), nek (sed tion mi nur konjektas) kun la pensmaniero de la proksimume 59 aliaj kristanaj SAT-anoj. Ekzemple, Syllabus ludas multe pli gravan rolon en la ateista mitologio, ol en la pensmaniero de efektive nuntempe ekzistantaj kristanoj.

Jakelino 1990/03/28

KONFUZOJ

Jakelino pretendas, ke Lanti, ĉar li estis franckulture edukita, konfuzis la nociojn "nacio" kaj "ŝtato". Nu, kiu kulpas pri tiu konfuzo ? Ĉu ne la naciistoj mem, kiuj faras el la litova nacio sendependan regnon regatan de suverena ŝtato disigita de Sovetunio ? Kiuj volas fari el la

korsika insulo ŝtaton apartigitan de la kontinenta Francio? kiuj volas unuigi la vaskajn provincojn en unu ŝtato sen-dependa de Hispanio kaj Francio? ktp...

Tio ŝajnas al mi kontraŭdiranta al la historia procezo. La nocio "nacio" en sia nuna senĉo naskiĝis dum la franca revolucio, kiu unuigis la provincojn en unu nacio kaj unu ŝtato, tiel kompletigante la longan efektivigon de la reĝoj. Simile kreiĝis la germana nacio per unuigo de Prusio, Bavario, ktp, la itala nacio per unuigo de Toskanio, Venecio, ktp...

Nun aperas du interkontraŭaj tendencoj:

1. Ree dispartigi la nunajn naciojn je provincoj.
2. Unuigi la Europajn naciojn en unu komunumo, konfederacia superŝtato.

Eble povos troviĝi sintezo: Eŭropa Unio kun pli aŭtonomaj "landoj" (Germanio) aŭ "regionoj" (Francio). Ŝajnas nun, ke tiu ĉi tendenco ja progresas en la eŭropaj mensoj.

Alian konfuzon ci faras, kara Jakelino, inter la nocioj "raciismo" kaj "sciencismo". La sciencistoj de la XIX-a jarcento estis ja religianoj, kiuj faris el la scienco ian diaĵon ĉiopovan, kiu solvos ĉiujn problemojn, kaj feliĉigos la homaron.

La raciistoj ne estas tiaj kredantoj. Ili ne kredas, sed observas, mezuras, pesas, deduktas, kaj konkludas ĉiam provizore. Ili konstatas, kaj ili scias, kion ili scias. Ili ankaŭ scias, ke ilia tuta scio estas relative tiel malgranda en komparo kun la tuto nesciata, ke ĝi povas esti rigardata kiel nula. La veraj nunaj scienculoj havas la modestecon de tiu maljuna instruisto, kiu diris al infano: "Etulo, mi instruos al ci ĉion, kion mi scias, kaj ci scios nenion."

Ili scias ankaŭ, ke la scienco nun progresas per gigantaj paŝoj, kaj pli kaj pli progresos, ke tiu progreso povos esti danĝera, eĉ pereiga por la homaro, sed ke ĝi povas, male, esti feliĉiga, se ili scipovos aldoni al ĝi etikan dimension. Pri tio ili nun pli kaj pli ekkonscias.

Necesas eltrovi sintezon inter la raciismo, etike indiferenta, kaj la sentimento.

Ĉar inter ili ne estas nesolvebla kontraŭeco. Kredu, kara Jakelino, ke cia dio amo, etendata al la tuta homaro kaj al la tuta vivantaro, ne estas nekonebla de la malvarmaj raciistoj, el kiuj mi estas.

(Mi ĵus finskribis tiujn ĉi liniojn, kiam mi legis en L!87 la artikolon de Suzanne "Racio aŭ malracieco?". En paĝoj 20-21 ŝi tre klare difinas la esencan diferencon inter sciencismo kaj raciismo.)

VALO

Noto de la red.: La teksto aperinta en L! 87, p.19/21, "Racio aŭ Malracio" efektive ne estis kompilaĵo, kiel mi erare komprenis, sed ja tradukaĵo, kies tekston Suzanne sendis ankaŭ al "Sennaciulo". Se mi estus tion eksciinta, mi ne estus aperiginta ĝin, ĉar principo de L! estas ne aperigi artikolojn aperintajn en aliaj gazetoj. Escepto povas esti nur kiam temas pri informoj diskonigeblaj al kiel eble plej vasta publiko. Krome, kiam mankas loko (kaj tio jam de longe plagas en L!) prioritare mi aperigas la originalajn tekstojn, prokrastante la publikigon de tradukaĵoj.

Al "La Letero de l' Akademio" kaj ĉiuj interesataj periodaĵoj

Reage al la artikolo de S-ro A. Albault en la Letero de l' Akademio de Esperanto (n-ro 10, Jan.Feb. Mar.1990) rilate al la problemoj pri land- kaj popol-nomoj:

Kvankam S-ro Albault ne skribas klare kiun formon uzas la Koreoj mem, ni kiuj vivas en Koreio kaj ĉiutage renkontas koreajn esperantistojn tre klare povas aserti ke ili preskaŭ ĉiuj (krom 2 kiujn ni notis...) uzas la vortojn "Koreio" por la landnomo kaj "Koreo" por la enloĝanto. Ĉu tiuj raraj esceptuloj intence uzas la aliajn nomojn estas plie dubinde.

S-ro Albault skribas "(...) ĉar ĉiuj Koreanoj, esperantistoj aŭ ne, perfekte scias, ke la nunaj esperantistaj ĉefoj en Koreo malpravas konservi tian misnomon kun neĝuste uzata sufikso -uj."

Kiel S-ro Albault informiĝis pri la perfekta scio

de ĉiuj Koreoj, esperantistoj aŭ ne??? Ni jam parolis kun centoj da esperantistoj en ĉi tiu lando (plus la neesperantistoj...) kaj neniam aŭdis plendojn pri la "misuzado de la ĉefoj". Ĉu Koreoj diras sian opinion al S-ro Albault kaj ĝin kaŝas antaŭ ni?

Ni konsilas al S-ro Albault viziti Koreion kaj surloke konstati la faktojn.

Alex Clabaut el Francio
Matumoto Hirojo el Japanio
Hylco Miedema el Nederlando

PRI RELIGIO - MATERIALISMO - RACISMO

Mi estas nova abonantino al L!. La legado de la mar-
ta/aprila broŝuro vekis ĉe mi deziron esprimi reagojn pri kelkaj temoj.

Mi ne estas dikredema. Ĉu mi estas materiistino, ĉu mi estas raciistino? Mi ne scias. Se oni povas aldoni ismon al dubo, demando, mi estas dubistino, demandistino.

Pri religio.

Kvankam mi estas scivolema demandistino, mi konfesas, ke mi neniam turmentiĝis pri la ekzisto aŭ la neekzisto de iu ajn dio. Tiu demando ŝajnas al mi (eble mi malpravas) tiom sen intereso, kiom informiĝi ĉu blanka merlo estas. Sed ofte mi demandis min, kial kaj kiel iuj povas esti kredantoj. Ĝis nun neniu donis al mi valoran respondon. Ankaŭ pro tio mi ne turmentiĝas. Ne gravas al mi, ke iuj kredas je Kristo, Alaho, Jehovo, Budao, Viŝnuo, Jupitero, Votano, Quetzacoatl (la kunpluma serpento), je Lugo, Cernunos (niaj gaŭlaj pradioj) aŭ je sennoma dio, se neniuj trudas al mi siajn kredojn, ne neniuj trudas al mi vivregulojn kongruantajn kun iliaj kredoj.

Sed de kelkaj jaroj denove fanatikismo leviĝas kaj oni ne povas esti sen reago.

La dion de Jakelino ŝi ne nomas sed "dio, kio estas amo". Mi tute konsentas, ke amo estas la ĉefa afero en la mondo. Nur kiam amo regos tutmonde (sed kiam?) ne

plu estos tiuj abomenaĵoj, kiujn ni vidas nuntempe.

Sed ĉu amo sen dio ne estas amo? Ĉu nur ĉar ŝi kredas je iu dio, Jakelino sentas amon al aliuloj? Ĉu, se ŝi ne estus dikredanta, ŝi rezignus pri Amnestio Internacia? Ĉu ŝi rezignus pri ĉiu helpo al aliaj? Ĉu ŝi ne plu laborus por provi iomete plibonigi la homaran vivon? Tion mi ne povas kredi.

Ĉu la homoj bezonas peradon de iu ajn dio por ami unu la alian? Ĉu ni bezonas, ke iu dio ordonu "ne mortigu" por ne mortigi? Pri tio mi neniam aŭdis iun ajn dion sed mi asertas, ke mi neniam buĉis iun. Ŝajnas, ke ĝis nun neniu dio multe helpis pri la homaj interrilatoj. Ĉu ni plu atendas tiun hipotezan dian helpon? Pli bone ni mem agu.

Se Jakelino trovas feliĉon, serenecon en "religia societo, kiu havas nek dogmojn nek ritojn", kiu retroviĝas en "adorkunvenoj", estas bone, ke ŝi daŭre tion faros. Ni povas tamen demandi ĉu aserti "Tiu dio estas amo" ne estas dogmo? kaj ĉu "retroviĝi en adorkunveno" ne estas rito?

Ĉiu rajtas trovi feliĉon, serenecon per alia rimedo: arto, sporto, legado, joko, ŝako. Kelkfoje oni devas dummomente perdi kontakton kun la homara realeco por trovi tuj poste novajn fortojn por denove lukti kontraŭ la malbonajn realaĵojn de tiu mondo.

Mi mem posedas naturan serenecon sed kelkfoje mi eskapas la realecon per revo. Same kiel Jakelino mi ŝatas historion. Mi reiras al la historiaj tempoj, la pratempoj, la tempoj kiam la homoj estis duonbestoj, bestoj, kiam ili estis nur molekuloj, kaj antaŭe atomoj ne dispartigitaj de la tuta terglobo, en unu vorto ne dispartigitaj de la "materio.

Tio kondukas nin al Materiismo, Scienco, racionalismo.

Jakelino interesiĝas nur pri "historio de ideoj, mitologio, psikologio, sociologio" t.e. sciencoj, kiuj temas nur pri la mensa parto de la homo. Ĉu ŝia dio kreis homojn sen korpo? Ĉu tiuj mensaj homoj flugas tra la etero, sen

iu rilato kun tio, kio ĉirkaŭas ilin, kosmo, tero, aero, ktp., en unu vorto : naturo? Aŭ tutsimple ĉu ŝi ne estas scivolema pri tio? Ĉu ŝia dio donis al ŝi sufiĉajn klarigojn por ke ŝi ne plu demandu sin pri io ajn? Mi, ateisto, konfesas ke mi estas scivolema, ke mi ĝojas ekscii ion novan, ke mi rigardas kaj aŭskultas ĉiudirekten.

Ĉu "la ideo, ke la homo devas regi naturon, venas de la Genezo" aŭ ĉu "la regado super la naturo rilatas kun la kreskado de la racio en la homa menso"? mi ne scias, sed la vorto "regi" ĉiam ĝenas min, eĉ kiam temas pri naturo. Ni vivas kune kun la naturo. Ni kontraktu kun ĝi. Ni ne perfortu ĝin sed ni ŝirmu nin ke ĝi ne perfortu nin. Ni uzu ĝiajn eblecojn, sed ni prizorgu ĝin. Pro tio ni bezonas scienculojn, kiuj uzas kiel eble plej bone siajn raciojn.

Kiam tempesto, ventego aŭ tertremo kaŭzas neatenditan damaĝon, oni povas opinii, ke naturo agas sen leĝo. Ĉu ne estas ĉar ĝis nun ni ne komprenis tiujn leĝojn? Kiam ni vidas ĉiunokte Lunon promenantan ĉirkaŭ Teron, tamen ni konstatas, ke estas naturleĝo kiun ni nomis gravito. Tre certe ni preskaŭ nenion scias pri tiu leĝo sed, ke ĝi estas, ĉu ni povas dubi? Multnombraj intelektaj personoj kredas je iu dio, pri kiu ili ekvidas absolute nenian spuron de pruvo. Mi stulte preferas kredi je io pri kio mi ekvidas komencon de pruvo. Scienco ne alportas certecon sed probablecon.

La scienculoj ne ĉion konas kaj ofte eraras, tamen la homa kono progresis iom post iom sur pluraj terenoj: astronomio, fiziko, biologio, kuracarto, teknikoj kaj eĉ sur la tereno de sciencoj ŝatataj de Jakelino : psikologio, sociologio.

Do, ofte scienculoj eraras. Sed, kiam iuj diris : "La atoma nukleo ne estas disigebla" ĉu estis esprimo de certeco? Kiam antaŭ jarcento kelkaj diris : "la homo neniam flugos" estis nur elreviĝa esprimo de iuj, kiuj ne sukcesis atingi al tio. Tre certe kelkaj scienculoj ne opiniis ebla la disigon de la nukleo, ĉar la serĉado plu daŭris. Ĉu nun la "kvarkoj" estos disigeblaj? Se tio interesas vin, mi konsilas al vi legi (se vi ne jam legis) la

tre interesan libron de la kanada astro-fizikisto Hubert Reeve (franclingve "L'heure de s'enivrer"), kiun ni povas eble traduki per "La horo por revii"? Vi scios, ke ne ĉiu scienculo estas pretendema homo tro certa pri sia scio.

Mi tute konsentas pri la difino de Suzanne pri racionalismo kaj la rolo de la homa racio. Mi aldonas kelkajn vortojn. Laŭ mi, racionalismo ne signifas ĉion klarigi, ĉion scii, sed uzi sian racion por unue provi kompreni ion, due trovi solvojn, trie elekti la malplej malbonan solvon. Diri, ke racion la homo uzas por malkovri kaj formuli la leĝojn de la universo, ne signifas, ke racio sufiĉas aŭ sufiĉos por ĉion klarigi. Mi ne absolute bezonas klarigojn pri ĉio, sed mi rifuzas falsajn klarigojn. Pli bone esti konscianta pri sia nescio ol doni al si falsajn certecojn. Ekzemple, kio alvenos post mia morto? Tio ne ĉagrenas min. Mi opinias, ke mia korpo disiĝos je multaj atomoj, kiuj forflugos aŭ eniros teren, kaj nenio pli. Ĉu mi estas certa pri tio? Ĝis alia pruvo, jes. Jakelino pravas : ateismo taŭgas kontraŭ mortangoro : pli kaj pli alproksimiĝas tiu tago, pli kaj pli mi sentas min serena.

Ĉu mia raciismo estas "bastardo de la kredo al la granda horloĝisto (Voltaire) aŭ de la arkitekto de la Universo"? Mi ne scias. Mi neniam starigis mian genealogian arbon. Pri la skribaĵoj de Kartezio, Voltaire aŭ Thomas Paine : unue, nur la aŭtoroj povas respondi, due eĉ geniuloj rajtas kelkfoje aserti fantaziaĵojn, tio tute ne malplivalorigas la alian parton de iliaj verkoj, trie ĉiu elektas en iu ajn verko tion, kio signifas ion por li.

Kompreneble, la legado de la famkonataj verkistoj influas nian pensmanieron. Pro tio oni devas tralegi diversopiniajn verkojn. Por mi la vorto "disciplo" je la senco "esti je plena interkonsento kun la majstro" estas fremda. Laŭ mi, disciplo rajtas, eĉ devas esplori la majstran penson. Ĉiu homo, mi opinias, estas unika. Mi estas ateisto sed mia ateismo tre certe ne estas la sama kiel tiu de aliaj. Same, ĉiu dikredanto ne similas al alia, vidu la multnombrajn sektojn. Eĉ inter du samsektanoj tre certe estas malsimilaĵoj, kaj tio estas bona : nenio estas tiom malĝoja kiom unuformeco.

Ĉu racio donos feliĉon al la homaro? Racio povas pli-bonigi la homaran vivon solvante problemojn. Feliĉo de-pendas ankaŭ de la afekcia parto de la cerbo, ne nur de la racia parto. Iom post iom la homoj eksciis uzi tiun ra-cian parton, sed oni povas konstati, ke la afekcia parto absolute ne progresas. Racio ne povas prizorgi pri kio ne estas ĝia tasko. Vera racio estas sufiĉe "racia" por kons-cii pri kio estas ĝia kampo kaj kio estas la kampo de la sentoj. Tamen, ĉu la homo ne povas uzi sian racion por konscii pri la malracieco de siaj sentoj, impulsoj, kaj ŝan-ĝi sian sintenon? Ekzemple : ĉu estas racie interbatali pro landlimoj, pro malsamaj vidpunktoj, ĉu estas racie uzi armilojn por plibonigi la homaran vivon? Ĉu estas racie buĉi homojn por trudi al ili dion, kiu estus amo?

Bedaŭrinde nia racio ne permesas al ni ĉion kompreni. La nuntempa homaro, oni diras, uzas nur 15% (20% ĉe la intelektuloj, sciencistoj) el la povo de sia cerbo. Ni povas esperi, ke ni ankoraŭ ne estas tute evoluintaj, ke la ven-ontaj homoj scios uzi la tutan povon de siaj cerboj, la ra-cian kaj la afekcian partojn. Tiam racio kaj amo regos surtere! Sed antaŭ tiuj tagoj kiom da duboj, kiom da de-mandoj! Ha! tamen, la tralegado de la marta/aprila n-ro de **Laŭte!** donis al mi unu certecon : Jakelino asertis : "la ateistoj en katolika lando estas pli stultaj ol en pro-testanta lando". Mi estas ateistino, kaj mi loĝas en lando, kie la katolikoj estas multnombraj. Do...

Mi multe dankas al la legantoj, kiuj ĝis fino legis mi-ajn stultajojn.

Renée Meurant

PRI JESUO, MALDECAJ VORTOJ, k.c.

Antaŭ ĉio mi petas al la piaj kristanoj ne ofendiĝi nek kolere kontraŭ mi, ĉar mi atakas nenium kaj ne-nion. Simple mi, kiel amanto de la filozofio, cerbum-adas en serĉo de la vero, faras mian eblon por iri al la kerno de la aferoj.

Tion ĵus legitan mi skribis, ĉar nun mi parolos pri Jesuo, la stariginto de kristanismo, kio okazis danke al la helpo de judo nomata Saŭlo, poste Paŭlo aŭ Sank-ta Paŭlo (2 a.K.-66 p.K.). Tiu Paŭlo, do, ne konis persone al Jesuo : li estis 2-jara, kiam okazis la krucumado.

Kaj mi min demandas (aliaj homoj faris al si saman demandon) : Ĉu Jesuo, la viro el karno kaj ostoj, vere ekzistis?

La nuraj historiaj referencoj pri li estas la Evan-gelioj, kiuj estis verkitaj sufiĉe da jaroj post la supozata krucumado de Jesuo.

En la fama verko **Judaj Malnovaĵoj**, de la juda his-toriisto Flavio Jozefo (37-95) ekzistas en kelkaj el-donoj jena paragrafo : "En tiu tempo estis krucumita iu Jesuo, kiu postlasis multajn disĉiplojn."

Sed spertuloj certigas, ke tiu paragrafo ne ekzis-tis en la originalo kaj estis aldonita en la mezepoko fare de kristanaj monakoj por firmigi la kredon pri la surtera ekzistado de Jesuo.

Ekzistas alia tradicio - inter rozkrucanoj -, kiu asertas, ke Jesuo ne mortis sur la kruco, ĉar last-momente venis pardono el Romo, estis dekrucumita kaj vivis sekrete multajn jarojn diskonigante sian doktri-non inter elektitaj disĉiploj.

Aliaj certigas, ke... ktp.

Ĉu li ekzistis aŭ ne, tio tute ne gravas : la vero estas, ke kristanismo ŝanĝis la homan historion kaj al ĝi ni ŝuldas la Sanktan Inkvizicion...

La nomata Sankta Inkvizicio estis la plej kruelega persekutmaŝino iam starigita de homoj sur nia planed-eto. Nur en Eŭropo ĝi bruligis vivaj 10 milionojn da homoj kaj aliaj 10 milionoj putris en siaj subteraj karceroj.

La religioj, tra la jarcentoj, tra la jarmiloj, al-portis al la homaro nur dolorojn kaj larmojn; kaj en mia opinio la vorto "Dio" estas maldeca vorto, ĉar en la nomo de "Dio" homoj - mi ripetas - , tra la jar-centoj, tra la jarmiloj, plenumis la plej abomenindajn krimojn.

Tamen la maldeca vorto plej internacia uzata en la

lastaj jaroj de la 20-a jarcento post Kristo estas "fekaĵo" (merdo); alia esprimo vaste uzata internacie kaj parenca al merdo estas : "usona dolaro".

Afablajn salutojn al ĉiuj gelaŭtuloj!

A. Lopez Luna

EN FORMO DE KRITIKA RECENZO

Ergoto de Bonaero afable sendis al mi sian lastan verkon "Karakole, Karambole", en kiuli lerte ekzercas sian versistan talenton. Inter la versaĵoj en tiu tre originala maniero, li miksis kelkajn prozajn ĉapitrojn pri esperantistoj kaj pri esperanto. Mi rimarkis interalie :

18. Familiareco ne dependas de pronomo.

En tiu ĉapitro li ĝoje enterigas la pronomon "ci", antaŭ duonjarcento mortigitan de K. Kalocsay (en "Lingvo Stilo Formo"), kiu eĉ pretendis, ke ĝi estis mortigita tuj post sia naskiĝo, de Zamenhof mem. Estas ja vere, ke Zamenhof neniam uzis ĝin - sed kion ni legas en la Fundamento? [Anstataŭ "ci" oni uzas ordinare "vi"].

Ordinare : mi akcentas la adverbon : ordinare ne signifas "ĉiam" kaj "devige". Per tiu konstanta uzado Zamenhof imitis la anglan lingvon, kiu tamen diras "thou" al Dio. Kaj ne nur al Dio, sed ankaŭ al diigitaj moralaj personoj. Mi konas usonan patriotan kanton, kiu komenciĝis per jenaj vortoj :

Our father's land, to thee,
Sweet land of Liberty,
To thee we sing.

Lando de miaj patroj, al ci,
Dolĉa lando de Libereco,
Al ci ni kantas.

Krom tiaj esceptoj, efektive la anglalingvanoj neniam uzas "thou, thee". Sed ĉu la lingvo internacia devas adopti la kutimon de unu nacia lingvo, nome la angla? Ĝi estas ja tre disvastigita, sed ĝi ne estas la lingvo de la plimulto el la homoj. Mi scie, ĉiuj aliaj eŭropaj ling-

voj uzas tiun pronomon de la dua persono singulara. La germana havas eĉ tri personojn : du, Ihr (euch), Sie ; same la itala : tu, voi, Lei, same la hispana : tu, vosotros, Usted (Fakte Lei kaj Usted estas adjektivoj : Via (moŝto). En tiuj lingvoj kiel en la franca, la pronomo "du" aŭ "tu" havas signifon de intimeco.

Ĝi ne havis tiun signifon en latino? Sed la latinlingvanoj ne diris "tu" al pluraj personoj, do ili distingis la singularon disde la pluralo, kion ne faras la anglalingvanoj. Tiurilate latino montris la logikan solvon : "ci" al unu persono, "vi" al pluraj. Same la araba, kvankam ankaŭ ĝi havas la pluralon de ĝentileco : anstataŭ "(Es)salamalik" oni povas diri ĝentile al unu persono "(Es)salam alikum" (saluton al vi)*

Ĉu esperantistoj uzante la pronomon "ci" fidele paŭzas nacilingvojn? Aŭ ĉu, dirante al ĉiu unuopulo "vi", ili paŭzas la anglan lingvon?

La ĉapitro komenciĝas per jenaj vortoj : "Lastatempe kelkaj Esp-istoj volas revivigi la mortnaskitan pronomon "ci", kaj finiĝas per : "Do, karaj samideanoj, lasu ripozi pace la mortinton."

Ne, kara Ergoto, ni ne volas lastatempe revivigi la pronomon "ci" : ni jam longe ja uzas ĝin inter ni, per silenta aŭ konscia interkonsenta konvencio, donante al ĝi la signifon de intima familiareco, kiun ĝi havas en multaj lingvoj, krom la angla. "Inter ni", tio signifas inter kelkaj esperantistoj, precipe en la SAT-medio. Eble vi prave rimarkus : precipe inter franclingvanoj. Mi diras "ci" al Kribo kaj al Jakelino, inter aliaj, kaj reciproke malgraŭ la aĝa diferenco.

Konklude : la mortinto ankoraŭ fartas sufiĉe bone, dankon.

Rimarko : ĉu via uzado de la signoj j kaj ŝ ĉe la komenco de frazoj ne estas fidela paŭso de la hispana? (kiun cetere mi aprobas, ĉar ĝi anoncas la naturon de la frazo)

Feliĉe Ergoto ne falis en la ridindecon de tiuj, kiuj akuzas la pronomon "ci" pri malbelsono. Al tiuj mi de-

* en alik, alikum, mi skribas per la ordinara a la guturalan "ain", kies sono ne ekzistas en esperanto.

mandas, ĉu tiu silabo malagrade sonas al iliaj oreloj en la nomo de la cigno, tiu bela harmoniforma birdo, aŭ en tiu de belaj ciganinoj.

4 kaj 30. Ergoto elokvente pledas por esperantigo de propraj nomoj, kaj tion mi plene aprobas - male al la opinio de la karmemora prof. Kanuto (Canuto), tiama prezidanto de UEA, kiu diris al mi : "Mi ne estas Georgo, mi estas Giorgio!" Tamen mi konfesas, ke la esperantigo iafaje estas malfacila, precipe pri anglaj kaj francaj nomoj. Eĉ pri aliaj, kiel Goethe, ĉar en esperanto ne ekzistas la sono de la germana oe aŭ ö. Ergoto proponas "Gojto", kiu ne ŝajnas al mi kontentiga. Aliaj skribas "Geto", kiu ne estas facile rekonebla. Eble mi preferus la grafikan "Goeto".

11. Pri virinaj nomoj adjektivaj.

Kiel Ergoto mi aprobas la kaloĉajan solvon, kaj konsekvence mi aprobas lian opinion, ke viraj nomoj devas finiĝi ne per a, (Ezra, Jesaja, Jeremia ktp.), sed per o (Ezro, Jesajo, Jeremie ktp.)

26.28. Mi aprobas la sintenon de Ergoto kontraŭ la uzadon en prozo de "esperantalaj" formoj. Mi konfesas, ke mi mem iafaje kulpis tiurilate, kaj mi promesas, ke mi strebos eviti tiun difekton estonte (se mi ankoraŭ havas estontecon).

27. Specio, kontraŭfundamenta vorto. Mi jam iam diris : ĉu ĉio, kio ne estas en la Fundamento, estas kontraŭfundamenta? Se tiel estus, ni trovus **multajn** kontraŭfundamentajn vortojn en la verkoj de Zamenhof mem.

Efektive en la franca lingvo ni havas nur unu vorton "espèce". Sed la komunvortara speco respondas al la angla "kind, kindness", al la germana "Art", kaj "specio", scienca termino, al la angle kaj germane adaptita latina vorto "species". Ni do uzu "speco" en ordinara prozo, sed konservu "specio" en natursciencaj tekstoj.

En venonta numero mi pritraktos aliajn ĉapitrojn, kiuj ŝajnas al mi diskutablaj kaj diskutindaj, ĉar tiu libreto estas dense riĉa en sia eta amplekso.

VALO



Ni relegu niajn klasikaĵojn

"Ĉu lingvo internacia estas bezona ? (...) ekzistas ankoraŭ multe da homoj, kiuj respondas je tiu demando per "ne". La sola motivo, kiun kelkaj el tiuj ĉi homoj elmetas, estas sekvanta : "lingvo internacia detruos la lingvojn naciajn kaj la naciojn". Ni konfesas, ke kiom ajn ni rompis al ni la kapon, ni neniel povis kompreni, en kio nome konsistis la malfeliĉo por la homaro, se en unu bela tago montriĝus, ke ne ekzistas jam plu nacioj kaj lingvoj naciaj, sed ekzistas nur unu ĉiuhoma familio kun unu ĉiuhoma lingvo."

Kiu diris tion ?

- Evidente Lanti.

- Erare ! Tio ĉi estas ekstrakto de longa teksto (Esenco kaj estonteco de la lingvo internacia), subskribita Unuel (pseŭdonomo de Zamenhof) kaj laŭtleĝita en franca traduko iom mallongigita, de L. de Beaufront en kongreso de l' Association pour l'Avancement des Sciences (Parizo 1900).

Sed ni daŭrigu la legadon :

"Sed ni supozu, ke tio ĉi efektive estus io terura, kaj ni rapidas trankviligi tiujn ĉi sinjorojn. Lingvo internacia deziras nur doni al la homoj de malsamaj popoloj, kiuj staras unuj antaŭ la aliaj kiel mutuloj, la eblon komprenadi unu alian, sed ĝi neniel intencas enmiksiĝi en la internan vivon de la popoloj.

(...) "Lingvo internacia" kaj "lingvo tutmonda" estas du tute malsamaj objektoj, kiujn miksi inter si oni neniel devas. Se ni supozas, ke fariĝos iam kunfluiĝo de la homoj en unu ĉiuhoman popolon, en tiu ĉi "malfeliĉo" (kiel nomos ĝin la naciaj ŝovinistoj) estos kulpa ne la lingvo internacia, sed la aliiĝintaj konvinkoj kaj opinioj de la homoj. Tiam efektive la lingvo internacia faciligos al la homoj la atingon de tio, kio antaŭe estos principe decidita de ili kiel dezirinda, sed se la celado al kunfluiĝo ne naskiĝos de la homoj memstare, la lingvo internacia certe ne volos altrudi al la homoj tiun unuiĝon."

De tiu teksto oni povas konkludi, ke Zamenhof opiniis dezirinda tiun "malfeliĉon" (la kunfluiĝon de la homoj en unu ĉiuhoman familion kun unu ĉiuhoma lingvo), sed li ne fiksis ĝin kiel celon al la disvastigo de esperanto. Efektive Lanti unua radikale kunligis la du aferojn.

Ni plu daŭrigu tiun tre interesan legadon :

"(...) Per si mem la lingvo internacia ne povas malfortigi la lingvojn naciajn, sed kontraŭe, ĝi sendube devas konduki al ilia granda fortiĝado kaj plena esplorado : dank'al la neceseco ellernadi diversajn fremdajn lingvojn, oni nun malofte povas renkonti homon, kiu posedas perfekte sian patran lingvon, kaj la lingvoj mem, konstante kunpuŝiĝante unuj kun la aliaj, pli kaj pli konfuziĝas, kripliĝas kaj perdas sian naturan riĉecon kaj ĉarmon ; sed kiam ĉiu el ni devos ellernadi nur unu fremdan lingvon (kaj ankoraŭ tre facilan), ĉiu el ni havos la eblon ellerni sian lingvon funde, kaj ĉiu lingvo, liberiĝinte de la premado de multaj najbaraj, kaj konservante plene por si sola ĉiujn fortojn de sia popolo, disvolviĝos baldaŭ plej potence kaj brile."

Tiel Zamenhof difinis la plej efikan dulingvismon : anstataŭ misuzi tempon kaj penadon por supraĵe lerni plurajn fremdajn lingvojn, ĉiu homo strebu plene posedi kaj mastri du lingvojn : sian gepatran kaj la internacian.

La tuta teksto de "Unuel" estas tre interesa kaj leginda.

Ĝi troviĝas en la Fundamenta Krestomatio, en la ĉapitro "Artikoloj pri esperanto".

Ni esperantistoj volonte legu la verkojn de niaj modernaj verkistoj, sed ni ne neglektu la riĉan trezoron de niaj klasikaĵoj.

La voĉo de la Majstro

De k-do Lentaigne, pere de S-ino Soulier, kiu faris plurajn kopiojn per sia magnetofono, mi ricevis kasedon, en kiu estas aŭdebla la voĉo de Zamenhof registrita en la jaroj 1902 kaj 1909. Krome aŭdiĝas belaj kantoj en esperanto, kaj la tuta teksto de la malferma parolado en la Unua Universala Kongreso en Bulonjo, 1905. Tiu ĉi ne estas el la voĉo de Zamenhof mem, sed laŭlegita de pola esperantista aktoro, kiu havas alian voĉtembron sed saman prononcon, tre netan kaj agrablan. Ne senemocie mi aŭskultis tiun famegan tekston, kiun mi scias preskaŭ parkere, ĉar mi relegis ĝin tiom da fojoj ! Ĝi finiĝas per la Preĝo sub la Verda Standardo. Mi scias, ke pluraj francaj samideanoj, laikaj, liberpensaj, malkonsilis al Zamenhof tiun aldonon, sed li obstinis. Mi, ateisto, opinias, ke li estis prava, ĉar tiu preĝo estis sincera esprimo de lia propra kredo, kaj tiu kredo plene akordis kun lia amo al la homaro.

Neatendita efiko

Tradukante el la franca originalo la libron de André Lorulot "Pourquoi je suis athée", mi trovis en ĝi validajn motivojn. Poste mi metis al mi mem la demandon : Kial mi estas ateisto. Post pripenso, la neatendita respondo estis :

Mi fariĝis ateisto post legado de la Biblio.

Mi estis 16-jara. Ĝis tiam, ne religie instruita, mi estis indiferenta al la temo. Mi simple ne sciis, kaj ne estis turmentata de scivolo. Mi sciis nur, ke la kristanoj trovas la Dian parolon kaj la Veron en la Biblio, en ĝiaj du partoj : la Malnova kaj la Nova Testamentoj.

Mi tiam komencis apliki al miaj legaĵoj kritikan analizon. Kuŝante sur lito pro akuta bronkito, mi prenis la

FRAGMENTOJ DE NEKONATA INSTRUO
de Petro USPENSKO (OUSPENSKY)
(resumpecoj)

dikan libron de miaj hugenotaj geavoj, kaj komencis legi ĝin. Malrapide, detale, atente. Mi trovis, ke ĝi konsistas el :

- Bela orienta poezio kaj belaj legendoj, en kiuj mi retrovis multajn personojn de nia franca literaturo, nutrita el tiu fonto kiel el tiu de la greka kaj romana mitologio.
- Plenaj paĝoj da seninteresa nomenklaturado.
- Trudaj leĝoj pli-malpli justaj, kelkaj pli-malpli ridindaj.
- Koleraj, admonoj, skoldoj, minacoj de ordonema, ĵaluza, incitigema, severega, foje kruela Sinjoro.
- Frenezaj profetaĵoj, kiujn la modernaj eldonistoj strebas pravigi laŭ postaj okazaĵoj kaj eventoj, per akrobataj interpretetoj.
- Historiaj rakontoj pri maldecaĵoj, malprudaĵoj, kiuj cetero neniel ŝokis min, ruzoj, trompoj, intrigoj, perfidoj, ĉiaj krimoj, murdoj, masakroj kaj ĉiaj malnoblaĵoj.
- Amaso da nekredeblaj absurdaĵoj, mirindaĵoj, mirakloj...

Kaj oni volus, ke mi prenu ĉion ĉi por paroloj de Dio, absoluta kaj nediskutebla Vero ! Senblage ?

Ja post tiu legado mi ne povis kredi pri la Dio de la Hebreoj, de la Kristanoj kaj de la Muzulmanoj - la sama sub la nomoj Javeh, Dio (en tri personoj?), Al-lah (la Dio).

Mi ne estis pli logita de la duopo Bono-Malbono de la Mazdeanoj, nek de la multopaj dioj de aliaj religioj. Eĉ la Buddismo, origine sendia religio, sed kiu, kiel aliaj, inventis miraklojn atribuitajn al Buddo, kaj kreis ritojn, ne tentis min.

Mia patro, kiel Robespierre, svage kredis pri iu Super-ega Esto, kiu regas la Universon. Nu, en la Universo mi vidas nek ordon nek harmonion, kiuj ekzistus, se ĝi estus regata de infinita Inteligento kaj Bono.

Kristanoj diras al mi : "Ni ne konvertos vin, sed vin konvertos Dio mem, kiam li tion decidus." (stranga Dio, ja!). Mi ridas.


Dum 74 jaroj mi vivis kiel ateisto. Krom ĉiam ebla frenezigo aŭ menskadukiĝo, mi mortos kiel ateisto.

LEĜO DE L'DESTINO KAJ LEĜO DE L'AKCIDENTO

(granda)

KOSMA OKTAVO (rilata al la universo)

RADIO DE KREADO



Ju pli da leĝoj sub kiujn la homo metiĝas, des pli ligita li estas al la leĝo de l'akcidento. (Vidi la supran diagramon). Ekzemple: la Personeco estas sub pli da leĝoj ol la Esenco, nome, la Esenco estas super la Personeco en la skalo de Esto, kaj la Reala MIO, super la Esenco. Psikologie la Esenco estas interna rilate la Personecon, k la Reala MIO estas interna rilate la Esencon. Tio pli interna estas pli alta en la skalo, sekve INTERNA signifas SUPERA!

La parto de nia esenca esto, nome, la Esenco estas sub la leĝo de l' destino. La parto de nia esto nomata Personeco (k speciale la Falsa Personeco k la iluzia aŭ imagata MIO) estas sub la leĝo de l' akcidento.

Ĉi tiu miksaĵo el Esenco, Personeco k Falsa Personeco konsistigas nian (ĝeneralan) nivelon de Esto; ĉi tio signifas ke ni estas sub leĝoj tre miksitaj, ĉar nia

esto ne troviĝas fandita en unueco; ĝi ne havas permanentan MION.

Kelkaj MIOJ estas sub la influo de 96 leĝoj; aliaj MIOJ estas sub la influo de 48 leĝoj, k iuj malmultaj estas sub la influo de 24 leĝoj. (Post la Esenco troviĝas la reala MIO).

Kiam la Personeco laŭgrade fariĝas pli pasiva, la Esenco komencas kreski interne de nia destino; ni komencas koni tion kio ni estas, sen-igante je tio kion oni al ni instruis aŭ ni imagis esti.

Ĉi tio signifas ke kiam la Esenco ekestas AKTIVA, ni iompostiom liberigias de la leĝo de l'akcidento por sekvi la leĝon de l'destino. Sub la leĝo de l'akcidento, ni ne estas en kontakto kun nia propra destino.

Forta Personeco, laŭ la Psikologio Transformista, estas signo de malforteco! La personoj kun forta Personeco, se la aferoj evoluas en direkton malsaman de tiu esperata, falas venkitaj, ĉar ili havas nenion realan malantaŭ si; al ili mankas fleksebleco; ili ne havas la povon adaptiĝi al la malsamaj situacioj. Multajn fojojn homo ŝajne malforta estas multe pli forta ol tiuj personoj de forta Personeco.

Sur la Tero la aferoj okazas tiom kaŭze de destino, kiom kaŭze de akcidento, la aferoj okazas juste k maljuste. Kiam ni identiĝas aŭ troviĝas en negativaj statoj, pli facile povas trafi nin la leĝo de l'akcidento.


La INTERNA DISIĜO (nome, disiĝi de la negativaj MIOJ senutilaj kaj malutilaj) (Ne identiĝo - ĉi tiu ne estas mia vera MIO-; Memoro pri si dividante la atenton) kondukas nin al la disvolvo de nia esenca vivo (disvolvo de la Esenco) sub la leĝo de nia vera destino, kaj tiel formiĝas la vera individueco.

En LA KVARA VOJO ĉio, kion vi lernos, estos taŭga helpe por via vivo kaj por atingi la celon de via vivo. Se vi okupiĝos pri aferoj de la vivo k vi lernos ne identiĝi (memori pri vi), vi kapablos plenumi vian celon en la vivo multe pli facile ol homo meĥanika k negativa!

LA LEĜO DE 7 AŬ LEĜO DE OKTAVO (el la 7a ĉapitro)

La leĝo de 7 aŭ leĝo de oktavo aŭ leĝo de ordo estas la 2^a fundamenta leĝo de l'Universo. Por kompreni ĝin, necesas imagi ke la universo konsistas el vibradoj, okazantaj en ĉiaj materioj; ĉi tiuj vibradoj devenas el pluraj fontoj k daŭrigas en plurajn direktojn.


La vibradoj estas nekontinuaĵoj; ĉu alsupraj ĉu desupraj, ili ne disvolviĝas unuforme, okazas periodaj akceladoj kaj bremsadoj, nome, la forto de origina impulso en la vibradoj fariĝas alterne pli forta k pli malfora. Ni imagu linion de vibradoj kreskantaj en la momento en kiu la frekvenco estas 1000 (vibradoj por sekundo); post iom da tempo, la nombro de vibradoj estas duobla: 2000 (vibradoj por sekundo).



Ĉi tiu periodo dividiĝas en 8 NEEGALAJN ŜTUPOJN respondantajn al akcelado kaj bremsado en la disvolviĝo de vibroj. La 8^a Ŝtupo estas la ripetigo de la 1-a, kun la duoblo de vibradoj. Ĉi tiu linio de disvolviĝo de vibradoj, ĝis la momento en kiu ĉi tiu nombro duobliĝas, nomiĝas OKTAVO, nome, konsistanta el 8 partoj. Ĉi tiu estas la formulo kiun oni aplikis en la muziko, tiel havigante la muzikan skalon el 7 tonoj. Ĉi tiu skalo el 7 tonoj estas formulo de kosma leĝo kiun ellaboris antikvaj skoloj esoteraj!

Ni revenu al la oktavo alsupra (en kiu la frekvenco de vibradoj kreskas) k ni supozu ke ĝi komencas la alsupron kun 1000 vibroj por sekundo. Ni nomu ĉi tiujn 1000 vibroj per la noto DO. La punkto en kiu la frekvenco atingas 2000 vibroj estos la 2^a DO, nome, la DO de la sekvanta oktavo.

Ĉi tiu periodo dividiĝas en 7 neegalajn partojn:



La raporto de frekvenco de vibradoj estos, se ni konsideras DO kiel 1, la jena:

1	9/8	5/4	4/3	3/2	5/3	15/8	2
DO	RE	MI	FA	SOL	LA	SI	DO

La diferenco en akcelado de vibroj aŭ alsupra progresado de notoj (aŭ diferenco de tono) estos:

DO al RE	9/8	% 1	= 9/8
RE al MI	5/4	% 9/8	= 10/9
MI al FA	4/3	% 5/4	= 16/15 bremsata progresado
FA al SOL	3/2	% 4/3	= 9/8
SOL al LA	5/3	% 3/2	= 10/9
LA al SI	15/8	% 5/3	= 9/8
SI al DO	2	% 15/8	= 16/15 bremsata progresado


La diferencoj inter la notoj nomiĝas INTERVALOJ. Estas 3 klasoj de intervaloj en la oktavo: 9/8, 10/9 kaj 16/15, kio en entjeraj nombroj estas: 405, 400, k 384. La plej malgranda intervalo troviĝas inter MI-FA kaj inter SI-DO; ĉi tiuj estas la 2 lokoj de malfruo aŭ bremsado en la oktavo.

En la muzika teorio estas 2 duontonoj inter 2 sinsekvaj notoj, escepte inter MI-FA kaj SI-DO, kiuj havas unu solan duontonon (la 2-a mankas), sed en la muzika praktiko estas 1 duontono inter 2 sinsekvaj notoj, kaj neniu inter MI-FA kaj SI-DO: ĉi tiuj estas la mankantaj duontonoj. Tial, kiam oni parolas pri la oktavo en "kosma" aŭ "meĥanika" senco, oni nomas "INTERVALO" nur la intervalojn MI-FA kaj SI-DO (nome, la plej etajn intervalojn).

En ĉiu momento de bremsado de vibroj okazas devojiĝo; la origina direkto restas ŝanĝita (ĝi suferas devojiĝon) En ĉiu oktavo la devojiĝo estas pli granda, tial la linio de oktavo ekformas duoncirklon kaj iras en direkton kontraŭan al la origina direkto; povante reveni al sia unua direkto, alivorte, formi kompletan cirklon. (Vidu la diagramon)

Ĉi tiu leĝo de-montras (=elmontras) kial nenio en niaj aktivecoj iras en rekta linio; ni tuj faras ion tute malsaman, kiu ofte estas kontraŭa al tiu unua, kvankam ni ne rimarkas tion kaj plupensas ke ni sekvas laŭ la sama linio.

Ekzemple, post periodo de energiaj aktivecoj, de intensa emocio, estas reago: la laboro fariĝas enuata, laciga; en la sento ekestas laciĝo, indiferento; ĝi fariĝas meĥanika, la sento pli kaj pli malfortiĝas; ardo, entuziasmo, agrablo transformiĝas en ĝenon, koleron, agaĉon. Poste, denove reago, halto, devojiĝo! La sama fenomeno ripetiĝas en ĉiuj sferoj de la homa aktiveco. Precipe en la socia kaj politika vivo, ni povas observi kiel la linio de disvolviĝo de fortoj devojiĝas de sia origina direkto kaj, post iom da tempo, ĝi iras en dia-



metre kontraŭan direkton, ANKORAŬ KONSERVANTE SIAN UNUAN NOMON. (*)

La studado de la historio, farata LAŬ ĈI TIU VID-PUNKTO, elstarigas la plej surprizajn faktojn, sed la "meĥanika" homaro ne volas atenti ilin. Eble, la plej ŝokajn ekzemplojn de tiaj ŝanĝoj de direkto oni povas trovi en la historio de 1' religioj, partikulare en la historio de 1' Kristana religio, se oni senpacie studas ĝin. Pripensu kiom da turniĝoj okazis en la linio de disvolviĝo de fortoj por pasi de la predikoj de amo de la Evangelioj ĝis la Inkvizicio; aŭ de la asketismo de la unuaj jarcentoj, KIAM ONI STUDADIS LA ESOTERAN KRISTANISMON, ĝis la skolastiko, kiu kalkuladis la nombron de anĝeloj, kiuj povis sidiĝi sur la pinto de kudrilo!


La LEĜO DE OKTAVO eksplikas multajn fenomenojn de nia vivo, kiuj sen ĝi, restus nekompreneblaj.

1-e La linio de oktavo (aŭ de vibroj, aŭ de disvolviĝo de fortoj) suferas DEVOJIĜOJN.

2-e Ĝi suferas ŝanĝojn, alsupras aŭ desupras, fortiĝas aŭ malfortiĝas, progresas aŭ degeneras, nome, ĝi moviĝas en linio de oktavo ALSUPRA aŭ DESUPRA.



3-e En la disvolviĝo mem de oktavo, alsupraj aŭ desupraj, senĉese okazas FLUKTUADOJ (=alternaj variaĵoj) ankaŭ alsupraj aŭ desupraj.



ALIAJ 2 PRINCIPOJ: Alsupro aŭ desupro estas NEEVITEBLA kaj la fluktuadoj estas PERIODAJ.

En nia vivo nenio restas egala kaj konstanta; ĉi tiuj alsuproj kaj desuproj, ĉi tiuj fluktuadoj de niaj anim-statoj, pensoj, sentoj, energioj, agadoj, respondas ĉu al periodoj de disvolviĝo de fortoj inter unu intervalo kaj alia, aŭ al la intervaloj mem.

La studado de la Leĝo de Oktavo montras ke la homo troviĝas submetita al la akcidento, al la hazardo; li

troviĝas en meĥanika linio de okazaĵoj. Por korekte disvolviĝi, la homo devas troviĝi en konscia linio, krea te la "kromajn forto-ŝokojn" (por plenigi la intervalojn!), per la transformado de impresoj k de negativaj emocioj.

(*) EKZEMPLE, EN NIA VERDA MOVADO (100-jara en 1987^a) oni konstatas fortan devojiĝon konsistantan el amaso da necesaj neologismoj kaj poezivortaĉoj ĉiam pliiĝantaj, kaj tute ŝanĝantaj nian lingvon, kiu plu-daŭras nomiĝi Esperanto, kaj tamen devus nomiĝi pseŭdoEsperanto aŭ Esperantaĉo! (Kaj fakte temas pri Esperantalo, la poezia ĵargono kokoliĉa-kiĉa!)

Klara ekzemplo de tio estas la mis-registraĵoj en: PIV, precipa disvastiganto de eraroj, jen: KOMPUTERO k SKETI; la 1^a anstataŭ la ĝusta: KOMPUTORO (**) analogie al aliaj aparatoj: interuptoro, kompresoro, monitoro; (k preterpase dirite, UEA kaj "FOKUSO" misuzas la vorton: KOMPUTILO kiu havas ĝeneralan sencon: ABAKO, KALKULILO, KOMPUTORO, KALKULATORO, k.t.p.); la 2^a, ja tute necesas anglaĵo kontraŭ-Fundamenta, anst. la tradicia: GLITI!

(**) En 1987^a, la PIVa SUPLEMENTO fine registris la analogie trafan, ĝustan k precizan: KOMPUTORO!!!

Resume kompilis: ERGOTO DE BONAERO



NUR KELKAJ ROZAJ FLOROJ EN FENESTRO

Timante, ke silentas nun Ergoto, mi komencas mem ŝancele paŝi al spiritaĵoj.

Ekzistas du sintenoj al naturo, spegulbildoj unu de alia, kiujn oni nun kutime kondamnas.

Unue, ke la homo tute superregas ĝin, do se anĝelon vidas l'azenino, ne la mastro (ĉapitro 22 de la bibliaj Nombroj), tio estas miraklo. Sokrato diris ion tian: "Iam oni kredis, kion diras arboj aŭ ŝtonoj, kondiĉe ke ĝi estu vera; nun oni kredas nur aŭtoritatojn". Laŭ Simone Weil kristanoj sub influo de Romo faris el la regno de Dio, en kiu egale gravas la diluvo kaj falanta folio, hierarkian imperion...

Due, sentimentala bildo: belaj estas floroj, birdoj ktp. dum homoj ĉion fuŝas... "Naturo plaĉas ĉie, / nur homoj estas fiaj", laŭ viktoriepoka angla himno por blagi subulojn. Kvazaŭ la homaro mem ne apartenus al naturo (povas esti, ke kancere trokreskinta parto!) De kie venis la disig'? Kaj kial, en komuna ĥoro, malsame kantas mar' kaj koro kaj veas la pensanta tig'?", pli subtile skribis rusa poeto Tjutĉev (alude al Paskalo).

Unu sinteno danĝera, alia malrealala, ambaŭ tro substrekas fendon inter homoj kaj cetero...

Mi ĵus legis en eseoj de Otakar Březina kelkajn simpatiajn frazojn kiuj helpas skizi anstataŭan sintenon. Březina (1868-1933), pinto de ĉeĥa poezio laŭ Arne Novák en "Ĉeĥa literaturo laŭ la birdperspektivo" (Brno, 1921; ne mencias lin l'Antologio de 1935), verkis ĉ. 1900 kaj poste silentis - ne pro frenezo kiel Hölderlin jarcenton pli frue, sed ĉar li diris la necesan, do - sufiĉas. Mi legis (kun vortaro enmane) l'eseojn "Celojn", "Kaŝitan Historion" kaj "Pacon".

Li verkis en profeta stilo kiu sonas malalloga nun. Sed frazoj kiel "Ruĝaj kaj purpuraj flamoj el gehenoj kaj espero vipas..." kaŝas kelkajn (laŭ mi) trafajn perlojn, kiujn mi elkonkigis por konstrui argumenton: (1) Difino de "ŝpirta mondo", kiu (2) estas nia mondo transformita, (3) kiel lingvoj nun plej ofte baras, sed kapablas ja esprimi (de diversaj vidpunktoj) miron (4) kaj necesas (en pluralo) por eldiri kiel eble plej la Teron, "ludi" nian instrumenton plengame...

1. Březina profetas, ne filozofias. Do li ne komencas

per difinoj. Sed tio estas laŭ mi nur stildiferenco. Legante jenan frazon, "Soleco ne ekzistas en la spirita mondo", oni povus bei : "kio estas la spirita mondo?". Sed kolektu kelkajn tiajn frazojn : traktu ilin ne rezultoj de esploroj, sed esprimoj de sopiro... Březina sopiras tian idealon : mondon sen soleco, sen "flustritaj" (vanaj) vortoj, mondon kie nenio perdiĝas, do sen vanaj penoj... Sopiro, kiun ni veruloj tro facile komprenas!

2. Nomu ĝin "spirita mondo" (se vi volas). Sed ne loku ĝin aparte.

"Riveroj, rokoj, maroj, klifoj, steloj parolas pri la nenombreblaj fratoj paŝintaj antaŭ ni kaj preparintaj la teron..." "La bildo de la mondo, kiun oni en amradioj vidas, estas kiel artverko kiun kreis mil mil fratoj."

Ni vidas kvazaŭ la "formkampojn" de Rupert Sheldrake, dank'al kiuj io jam farita pli facile fareblas, pase-roj pli rapide lernas beki staniolajn laktbotelkovriilojn sen kontakto kun aliaj - doktrino preskaŭ suspektinde tro konsola al verduo ne varbema! (Prelegis pri la temo Albert Goodheir)

3. Kiel do transformi? "Unusolan, nian propran spiritan lingvon ni aŭdas en ĉiuj lingvoj de la Tero - timinte ke la nekonataj vortoj kontraŭ ni komplotas."

"Ĉiuj lingvoj estas vana peno esprimi miron pri aferoj, ĉu ne?" Do ni turnu llin "kontraŭ morto kaj doloro kaj demonaj fortoj en la korprofundoj". Ĉu tio facilanima frazo? Ke "bataloj sur la Tero nur bildigas la batalojn de la nevidebla mondo", "elementaj fortoj kunlaboras por averti preter vortoj, per divenoj, subkonscie : la suno brulas kvazaŭ la standardon de l' spiritarmeo blovas vento..."?

4. "Kunigi la homaron" oni vane penis : "mankos paco dum spiritarmeoj staras unu kontraŭ alia". "Perforte unuigi la naciojn pli doloras la Teron." (nacio : "socio de mortintoj kaj vivantoj kaj nenaskitoj" - al kiuj skribis iam mesaĝon Ševĉenko) "Ĉar nacio kiu kreskis

ĝis laboro por konscii sin, sopiras eternon. Morti ĝi ne volas : nur propravole ĝi aliĝos la socion de l' spirita tasko de l'homaro. Neniom en alia nacio, sed ĉiam plej profunde de la propra vivo nacio trovas la plej grandajn malamikojn kaj minacojn..."

"Nur unusola malamiko / ekzistas nia propra kor'," sentencis iam ukraina poeto Tyĉyna. Sed mi finos per du bildoj de Březina : "La filozofo premis araneon en libron, meditante pri l'doktrinoj: ĝi ombros la radie puran sonĝon." "Laboro de abeloj en arbaro / obeas arbariston surĉielan; ne konas la mielon arbares-troj."

Nu, post mia lakto (kaj mielo), "lakta voj' el forbrulintaj sunoj", vi sopiras la viandon de Ergoto, ĉu ne?

Meva Maron

MANGĜI KOREASTILE

Facilas mangi malmulte koste en Koreio. Mangejoj amasas preskaŭ ĉie en la grandaj urboj, ĉie kie troviĝas vendejoj kaj oficejoj. Vi elektas inter deko da pladoj kaj pagas inter 800 kaj 1500 ŭonojn* Mangejoj ofte malgrandas enhavante nur kelkajn tablojn, ĉirkaŭ 15 klientoj. Kurejo ĉiam troviĝas en la sama salono kaj necesejo plej ofte ne estas. Homoj, ĉu laboristoj ĉu promenantoj, mangas rapide kaj silente. Pureco estas foje dubinda sed mi ne plu atentis tion... Pri la mangajoj mem alian fojon mi raportos, tamen mi jam povas diri, ke post viziti mangejon mi sufiĉe satas kvankam mi dubas ĉu mi ricevis sufiĉe da proteinoj. Aliaj mangejoj pli grandaj enhavas 1 aŭ plurajn ĉambrojn por klientoj kiuj venas grupe - amikoj aŭ kolegoj. Antaŭ ol eniri iun tian ĉambron, oni devige sensuiĝas kaj poste sidiĝas surplanke, kun kruroj krucitaj**, ĉirkaŭ malalta tablo.

Alia ebleco por mangi ankoraŭ pli rapide estas sendi la mangon pertelefone. Tiam, post duonhoru, junulo envenas vian oficejon kun metala kesto entenanta la divers-

ajn mendojn. Vi manĝas samrapide sed ne plu bezonas eliri el la oficejo...

Multaj Koreoj plenigas sian stomakon en manĝejoj ĉiutage pro oportuno, sed ili ŝatas foje ankaŭ viziti restoraciojn (restoracio estas luksa sed multekosta manĝejo). Plej ŝatataj restoracioj estas kompreneble la koreaj, sed ankaŭ la japanaj, la ĉinaj kaj la okcidentstilaj. Mi fine mencias la ekziston de "Mac Donald" kaj aliaj tiuspecaj manĝejoj, kiujn mi neniam vizitas.

Manĝi en familia hejmo estas ĉiam pli lukse kaj bon-guste ol en manĝejo. Laŭ la nombro da familioj, kiujn mi vizitis, oni plej ofte manĝas surplanke ĉirkaŭ la malalta tablo, tute certe kiam gastoj invititas. Tamen ŝajnas al mi ke pli kaj pli da Koreoj manĝas sidante kiel Okcidentanoj ĉirkaŭ alta tablo, kiu cetere troviĝas en plej multaj hejmoj. Ĉiuj Koreoj lernis kuirarton de sia patrino kaj uzas multe da tempo por kuiru. Viroj (laŭ tio, kion mi vidis) kutime ne helpas. Nuntempe virinoj manĝas kune kun la viroj krom en kelkaj konfuceanismaj familioj. Tamen kiam venas gastoj, la dommastrino (t.e. la edzino) manĝas aparte aŭ poste pro la daŭra kuirpreparado. Male al Japanoj, kiuj uzas nur bastonetojn, korea manĝilaro konsistas el bastonetoj kaj kulero. Por kelkaj manĝaĵoj, ankaŭ manoj uzeblas. Mi bezonis nur kelkajn tagojn por lerni ĝustan uzadon de lignaj bastonetoj, unu monaton por la metalaj, kiuj tre glitemas...

Manĝi koreastile ne ĉiam oportunas laŭ mi : Dum montopromenado, necesis pli ol unu horo kaj duono por pretigi la manĝon far la inoj de nia grupo...

* Unu franca franko egalas pli ol 100 ŭonojn.

** Tiu pozicio cetere ne tre komfortas al Okcidentanoj. Estas konsilinde ekzerciĝi sidi kiel faras Koreoj antaŭ ol vojaĝi ĉi tien.

R.A.

UNU HOMARO, 365 FROMAĜOJ

Laŭdire estas en Francio tiom da fromaĝoj, kiom da tagoj en unu jaro. Mi ne scias, ĉu tio veras, sed efektive estas en Francio multegaj fromaĝoj, kaj plej ofte ili havas nomojn eltiritajn el lokaj dialektoj.

Eta praktika problemo : iu volas verki en Esperanto gastronomian libron pri la laŭdire 365 fromaĝoj de Francio. Kiel li ilin nomu? Estas tri ebloj :

- "Unu homaro, unu lingvo" : Kiel diras Ledon en sia libro, manĝi estas universala trajto de la homa specio. Do nur fia naciisto povas interesiĝi pri la diferenco inter "gäperon" kaj "fourme d'Ambert". Ĉiuj fromaĝoj de la mondo nomiĝu simple : fromaĝo.

- "Unu homaro, unu lingvo" : Ĉion, kion oni povas diri en iu ajn etna lingvo, oni povu diri en Esperanto! Do mi deziras bonan apetiton al la akademianoj, kiuj devos inventi unu nomon en Esperanto por ĉiu fromaĝo, kiu ekzistas ie ajn en la mondo. Kaj kompreneble, kiam ĉiuj dancistinoj de insulo Balio estos lernintaj Esperanton kaj volos klarigi pri sia arto, necesos inventi unu vorton por ĉiu el la pozicioj de iliaj korpoj dum la dancado. Ja estas francoj en la Akademio de Esperanto, kaj kredeble ili ŝatas fromaĝojn, sed ankoraŭ ne estas en nia Akademio, laŭ mia scio, specialisto pri aziaj dancoj. Sed se homo kapablas distingi du konceptojn, li bezonas du vortojn por ilin esprimi. Do se realiĝos la celo de Lanti, ke la tuta homaro havu nur unu kulturlingvon, tiam devos ekzisti en tiu lingvo unu vorto por ĉiu koncepto, kiun kapablas produkti homa menso ie ajn en la mondo.

- se germano skribus libron pri la 365 francaj fromaĝoj, eble la alzacan fromaĝon "munster" li nomus Müns-terkäse, sed la aliajn fromaĝojn li nomus per la lokaj, etnaj nomoj : Gäperon, Fourme, ktp. Do same faru esperantisto. Jam ekzistas la vorto "rokforto", do bone. Se estas unu fromaĝo, kiu venas el la alzaca urbeto Munster, oni povas diri "fromaĝo el Munster en Alzaco" (ĉar ekzistas multaj urboj, kiuj nomiĝas Münster), sa-

me oni povus diri "fromaĝo el Ambert". Sed oni diru "gaperon", "reblochon", ktp. En gastronomia libro la klarigojn donos la teksto. Se hazarde en alispeca teksto aperas la vorto "gaperon", oni skribu "gaperon", kaj metu piednoton. Ĉu vere oni inventu internaciajn vortojn por aĵoj, kiuj estas lokaj? Se etnaj lingvoj devas malaperi, tio estas nepre neceso, krom se oni opinias, ke krom unu lingvo la tuta homaro devas havi nur unu fromaĝon. Se balia dancistino skribus libron en franca lingvo pri sia arto, ŝi konservus la baliajn teknikajn vortojn, provante ilin tiel skribi en la franca, ke franclingva leganto ne tro misprononcu. Kaj en la libro nepre necesus fotoj aŭ desegnoj por klarigi, pri kio temas. Sed imagu la mienojn de la 40 francaj geakademianoj, se oni postulus de ili, ke ili inventu unu francan vorton por ĉiu pozicio de la korpo de balia dancistino!

Diri en unu lingvo ĉion, kio penseblas en la mondo, ne eblas. Do nepre ĉiu etno gardu sian lingvon kaj esperantistoj, kiuj volas paroli pri etna realaĵo, uzu etnan vorton.

Vere, ĉu elteneblus mondo kun unu fromaĝo?

Jakelino

VI ESTAS MIA ROZEJO

Vi estas mia rozejo,
Maks,
per kiu mi plektis
mian kronon de floroj!
En la malgranda silento, kiu maceras,
mi vigliĝas
pensante al vi,
vin benante por la lumo,
kiun Vi disŝutis sur mia vojo.

Lina Trenner Gabrielli

Memore al mia edzo Maksmilien Trenner.

KIAMANIERE, EN DAŬRO DE KVIN HOROJ ELLERNI SKRIBI VERSOJN?

fare de
Sergej Stepanov

Ĉiu esperantisto, kiu interesiĝas pri beletro, notis abundan elverŝon da poemoj en nia internacia lingvo. Tiu fenomeno certe ĝojigus nin, se la kvalito de la versoj havus altan kalibron.

Bedaŭrinde, ĉe multaj presitaj en libroj kaj gazetoj versoj ni vidas - milde parolante - krudan diletantecon. En ili mankas aŭ senco, aŭ ritmo, aŭ rimoj.

Tre ofte, en ili forestas ĉiu el tiuj tri esencaj elementoj de versfarado. Do, la leganto havas nenian plezuron ensorbante tiajn versojn.

Ĉu post esperanta centjariĝo jam ne venis tempo por inaŭguri skribon de bonaj versoj? Kaj aldone: ĉu ne venis tempo por tute ĉesi skribi versojn fare de personoj kiuj havas nek tempon, nek persiston aŭ talenton por komponi ilin?

Kaj en rilato al tiu parto pri la ĉeso de verskompono, mi komunikos etan historion el la vivo de eminenta rusa poeto Majakovskij.

Kelke da jaroj antaŭe, ie en la jaroj 1925 aŭ 1926, Majakovskij vizitis urbon Krasnodar en Rusujo. Li tralegis tie sian lecion pri poezio.

La afiŝoj pri la lekcio, gluitaj sur reklamaj kolonoj, anoncis diversajn temojn de lia prelego. Inter aliaj temoj troviĝis tia: "Kiamaniere, en daŭro de kvin horoj ellerni skribi versojn?"

Mi havis privilegion ĉeesti lian lecion.

Dum la lekcio Majakovskij diris ke ni renkontas multe da poetoj en Rusujo. Ili skribas milojn kaj milojn da versoj. Sed ho, ve!

En siaj versoj poetoj ne sekvas eĉ la plej elementajn regulojn de versfarado. Ili ne pensas pri ritmo kaj rimoj.. Kaj tre ofte eĉ pri enhavo de siaj poemoj.

Laboro de poeto konsumas multe da tempo kaj energio. Tia laboro taŭgas nur por diligentaj homoj.

Por montri kiom multe da tempo la laboro de poeto postulas, li rakontis unu epizodon el sia praktiko.

Iam moskva ĵurnalo Pravda komisiis al Majakovskij skribi poemon. Post kelke da tagoj ekde la mendo, Majakovskij finis skribi la poemon. Bedaŭrinde en ĝi mankis unu rimo. Kaj kvankam ankoraŭ restis kvar tagoj ĝis la dato kiam li devis transdoni la poemon al la redaktoro, tamen Majakovskij ne sentis sin trankvila.

Kun ĉiuj siaj fortoj li serĉis la rimon. Kaj en la daŭro de tiu serĉado, dum kvar tagoj, li troviĝis en la stato de ia koŝmara morbo.

Tamen senutile. Ĉar la dezirata rimo ne aperis.

Ĉi tie necesas memori ke Majakovskij neniam uzis en siaj poemoj rimojn kiujn oni povas trovi en ia rimvortaro.

Kaj jen venis la tago en kiu li devis liveri la poemon;

Atinginte la punkton de kolapso Majakovskij ekiris al la redakcio de Pravda, por peti ke oni donu al li ankoraŭ kelke da tagoj ĝis kiam li trovos la mankantan rimon.

Nun, sur la vojo al la redakcio, li ekrigardis sur la arbon kiun li preterpasis. Kaj la rimo kiun li tiel longe kaj vane serĉis sidis sur la branĉo de la arbo.

Li rapide ekkaptis la rimon je la vosto, enmetis ĝin en la poemon, kaj alportis la finitan skribajon al la redaktoro.

Do, nun ni konkludu : kvar tagoj de laboro por unu rimo. Pripensu!

Dum sia lekcio Majakovskij rakontis pri tio kiel en dista pasinteco oni eldonis libron kiu nomiĝis : "Kiamaniere en la daŭro de kvin horoj ellerni skribi versojn?"

Sed en tiu dista tempo homoj, kiel regulo, ankoraŭ ne sciis kiom multe da tempo postulas la metio de versfarado.

Kaj aperte parolante, hodiaŭ, mi invitis aŭskultantojn ĉi tien ne por instrui kiamaniere en daŭro de kvin horoj vi povos ellerni skribi versojn. Mi invitis vin ĉi tien por

ke vi ĉesu skribi versojn.

Trovu ian alian taŭgan por vi okupon, se vi ne volas oferi ĉiujn viajn povojn al poezio. Kaj forgesu pri versfarado.

Nun por montri kiel Majakovskij mem laboris je poezio, mi montros mikran parton el lia poemo "Bone". Ĝin tradukis en Esperanton Gusev.

Kvankam Gusev tradukis la poemon ne tute perfekte, tamen, eĉ ĝia traduko montras kiel zorge Majakovskij poluris siajn versojn.

En la poemo "Bone" temas pri la tempo de lasta rusa revolucio kaj komenciĝanta civila milito. Kiel rezulto de ili en la ĉefurbo de Rusujo Petrograd regis detruigo kaj malsato.

Skribis Majakovskij :

Blovis

kutime

oktobraj

ventoj,

kiel ĉiam

dum tempoj burĝaj.

Trans Trockij

tramojn

laŭ reloj-serpentoj

forblovis

bezonoj

urĝaj.

La kuracisto

ripeti

ne ĉesas :

por ŝia

ekzisto

verdaĵo

necesas.

Ne por hejma

famili' -

por amata

moŝto

du karotojn

portas

mi
je la verda vosto.

Nun aldone, petante indulgon, mi aŭdacas prezenti la pecon el la kruda poezio. Ĝin presis esperanta gazeto **Laŭte** en sia 83-a numero.

Aŭguras morton ĉiririnko,
brilblua muŝo ; sen kipu' -
kontret' - inkaan fonton trinki...
nokte pukupuk'
funebbras - kune kun kolomb'
en lambroj, dorna vepr' ; al tomb'
- pukulo, tura katakomb' -
smeralde vibras verd' : kolibro.

Kontraŭ tiaj ne poluritaj versoj klopodis Majakovskij dum sia prelego. "Bonvolu ĉesi presi tiajn versojn se vi ne volas serioze labori."

La negativa flanko de tiaj enuigaj versoj troviĝas en tio ke multaj esperantistoj ne plu legas poezion.

Kaj nun mi volas fini montrante la fragmenton el poezio kies tralego donas veran plezuron.

Verda stelo sur la brusto
iom palas pro la rusto.
Mi ne estas purigisto ;
estas mi esperantisto.

Polvkovrite sur bretaro
putras mia SAT-vortaro.
Tedas min la vorto-listo ;
estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas
kaj gazeton ne abonas...
Librojn legu la verkisto ;
estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido :
Bonan tagon! Ĝis revido!
Ĝi sufiĉas por ekzisto ;
estas mi esperantisto.

La verson kreis Julio Baghy. Imitu lian majstrecon.

Diras E. Lanti : "Kiam mi relegas miajn skribaĵojn, nemalofte okazas, ke la stilo ne tute kontentigas min. Bualo ja estis prava, kiu rekomendis dudekfoje reprilabori verkaĵojn. Kaj Flober ne estas mokinda kiu, siadire, ŝvitis dum 12 horoj por verki nur du-tri paĝojn."

Kaj se eĉ en la prozo verkistoj devas labori tiel diligente - despli en poezio, la versfarantoj devas labori ĝis laciĝo.

Sur la Parnasa kampo de publikigita poezio ne devas ekzisti placo por pigraj verkistoj.

EN AIKSO-LA-PROVENCA STUDTAGO PRI INSTRUADO DE ESPERANTO

...okazos sabaton la 9an de junio en la Universitata Centro, 29 avenuo R.Schumann, ekde la 9a matene, en la salono n-ro 410 (4a etaĝo). La debatojn enkondukos jenaj prelegoj :

Jean-Pierre CAVELAN : Freŝaj provoj de nesperta instruanto.

Michel DUC GONINAZ : Pri la instruado de Esperanto en universitatoj kaj altlernejoj. Pri la "reguleco" de Esp-o.

André GENTE : La legolibro de Lentaigne "40 paŝetoj"

Daniel MOIRAND : Transitivité et complément d'objet direct en espéranto.

Renée TRIOLLE : Kiel esperantistigi eklerninton?

Ronda tablo okazos pri la nuntempaj instrumentoj. Libroservon prizorgos la E-Federacio de Vaŭkluzo.

ĜENERALA ASEMBLEO DE A.E.R.A.

OKAZOS DIMANĈON 17an de JUNIO

posttagmeze, en "Cargue Sac", F-47470 BEAUVILLE
Tagordo : Ĉu ŝanĝi la sidej-adreson, la asoci-nomon?

Raportoj pri aktiveco kaj kaso. Nuna stato de ekipado de la Muelejo. Projektoj.

Bonvenon al ĉiuj, kiuj povos ĉeesti!

Kiuj deziras alveni matene kaj pikniki en la muelejo, tiuj bonvolu nur sin anonci letere aŭ telefone al la sidejo de "Laŭte". Tel: 53 95 40 26.

Brila ideo de Pastro Kostantino Kapučeno

Pastro Kostantino Kapučeno fondis MAC-n (Movada Asocio de Blinduloj), kiu estis benita de Episkopo Marcello Morgante kaj kiu poste malkuniĝis pro liaj kunfratoj.

Pastro Kostantino mem estas nevidanto, sed tio ne malhelpas lin skribi poemojn, kiujn liaj amikoj konsistigas en kajerojn. Sume, li havas pli da amikoj inter la laikoj ol inter la religiuloj.

Antaŭ kelkaj jaroj, kiam la UEA-Kongreso okazis en Varna, kaj mi ne partoprenis en ĝi, Pastro Kostantino havis la brilan ideon starigi dutagan ekskurson en vilaĝo Abetito de Montegallo, ĉe la kolonio de la Paroĥejo, kolektante kvin-ses geblindulojn kaj aron de gejunuletoj, viroj, virinoj kaj aliaj personoj kun bona volo.

Pastro Kostantino diris al mi:

- Lina, ĉu vi volas partopreni nian kuniĝon? Ĝi okazos fine de julio.

Ĉar mi ne intencis iri al Varna, kaj pro tio mi estis tute libera, mi jesis kun granda entuziasmo.

- Nu, mankas al ni persono, kiu scias kuir. Ĉu vi estus preta prepari la manĝaĵojn por ĉiuj?

Mi denove jesis, ne dirante al Pastro Kostantino, ke mi ne scias kuir, ke en mia hejmo kuiras mia patrino, ke, kiam mi rehejmiĝas el la oficejo, ĉio estas preta. Sed la duan jeson mi ne donis pro facilanimeco kaj pro senhonteco. Mi estis - kaj estas - konvinkita, ke per la amo kaj la bona volo, ke por plezurigi iun, oni povas eĉ deloki la montegojn.

Mi estis tiom entuziasmigita, ke revenante hejmen mi rakontis ĉion al mia patrino kaj al mia najbarino Teresa.

Mia patrino skuis la kapon dubeme, preskaŭ riproĉante min pro mia senkonsidereco, sed Teresa vive atakis min, eĉ kruele. Ŝi brudis je la penso, ke mi kuiros por multaj personoj.

Ja, mi, doktorino, verkistino, oficistino... ĉu ankaŭ kuiristino? La kulmino. Kaj ŝi, brava dommastrino, kiu ŝi estas? La envio kaj la kolero rodas ŝin. Se ne estus pro

la envio kaj la kolero, ŝia reago antaŭ mia promeso estus tute alia.

Tamen mi ne reprenis mian promeson. Sed dum mi vizitis denove Pastron Kostantino, tiu ĉi diris al mi:

- Lina, mi ne bezonas vin por kuir. Venos virino, kiu kuiras en la kazerno de la policistoj. Vi povus roli kiel kuirhelpantino. Tiamaniere vi estos senrespondeca kaj samtempe same utila al la kolektivo. Senseligigi la terpomojn, purigi la verdaĵojn, lavi la telerojn, balai la plankon...

- Jes, jes, Pastro Kostantino, estas same bone por mi.

Tiamaniere mi trovis min liberigita de la promeso, por kiu eble ne sufiĉus amo kaj bona volo.

Sed alian tagon Pastro Kostantino diris al mi:

- Lina, ni ne bezonas, ke vi helpu eĉ kiel kuirhelpantino. Multaj sinjorinoj sin proponis por tiu humila servo. Vi povos prepari la manĝotablojn.

- Jes, jes, Pastro Kostantino.

Nu, eĉ tio ne realiĝis. Pastro Kostantino diris al mi:

- Ni havas ankaŭ tiun, kiu pretigos la tablojn. Tamen vi, kiu multe vojaĝis, kaj multe vidis, povas fari kompanion al la nevidantoj dum la manĝoj, rakontante al ili viajn travivaĵojn kaj spertojn. Ankaŭ tio estas granda karitato.

- Estas vere, Pastro Kostantino.

- Bone, tre brava! Tio ĉi estas la Dia volo.

Fine alvenis la tago de la foriro.

Ĝuste sciante kion mi devos fari, ni direktiĝis al Montegallo. Pastro Kostantino, sidanta kun sia ega korpo en mia aŭtomobilo, preskaŭ frakasis ĝin. Malantaŭ ni sidis du niaj amikoj.

Malgraŭ ke mi devis nur babili, mi surmetis antaŭtukon, dum Pastro Kostantino ĝuis la ĝojojn de la Parado.

Por paroladi ĉe la tabloj mankis okazoj: ĉiuj havis siajn distrojn.

Pastro Kostantino volis viziti la Sanktejon de la Madono de la Ambro. Forveturis tri-kvar aŭtomobiloj kun sesdekjaraj junuloj en kunesto de la nevidantoj. Pastro Kostantino estis kun mi.

En la Sanktejo mi rimarkis, ke la okuloj de la Dipatrino moviĝas. Mi rigardis kaj rigardis ŝin. Vere, ŝi mo-

vas la okulojn.

- Pastro Kostantino, mi ne komprenas la kialon...

- Ĉar vi estas sanktulino, - li verdiktis.

Sed mi klopodis malkovri la fenomenon: estas la reflektado de la flamoj de la kandeloj, kiuj moviĝis sur la okuloj, donante la impreson, ke la okuloj mem moviĝas.

Pastro Kostantino tiun vesperon subridis:

- Lina estas sanktulino, ĉar ŝi vidis moviĝi la okulojn de la Madono.

Tiam mi rebatis triumfe:

- Ne aŭskultu lin! Estis la kandeloj!

Nur la dimanĉon, antaŭ ol reveni al la urbo, mi povis iom konversacii ĉe la manĝotablo.

Sidis antaŭ mi la pastro kaj la instruistino de la vilaĝo.

Mi ne scias, mi ne memoras kiamaniere la parolado tuŝis la fizikajn mankojn.

La instruistino diris: "Ni devas senti nin honorataj pro la invalidecoj, kiuj trafas nin. Temas pri aparta graco. Fizika difekto estas privilegio, didonaco. Vidu, Jesuo Kristo mortis krucumita, antaŭ ol li povus esti blinda, surda, lama, unumana, muta... Tiam li lasis tiujn invalidecojn al ni, por ke ni suferu ilin anstataŭ li. Jes, estas graco, ke li elektis nin por suferi kion li volis suferi!"

Al mi tiaj asertoj ŝajnis groteskaj, por ne diri pli; pro tio mi turnis min al la pastro por aŭdi lian opinion, preskaŭ por avari la mian... Sed mirego de la miregoj, li subtenis la instruistinon.

Ho, kiom bela estis tiu libertempo! La libertempo kun Pastro Kostantino kaj liaj admirantoj, vidantoj kaj nevidantoj! Sed mi estis nek kuiristino, nek kuirhelpantino, nek aranĝanto de la manĝotabloj, nek parolantino.

Reakompanante Pastron Kostantino al monaĥejo, lia hortokulturisto diris al mi kortuŝajn vortojn. Kaj tiun dolĉan emociion pro la laŭdoj al mi, mi portis donace al mia patrino, ĉe kiu mi sidis en la saloneto de la televido, dum alproksimiĝis la vespero.

Benindaj memoraĵoj!

Lina GABRIELLI

La domoj de mia vojaĝo

La 15-an de julio mi ekflugis sola per aviadilo el Varsovio al Parizo. Mi timis, ĉar mi forveturis per tiu veturilo eksterlanden unufoje kaj mi ne konis flughavenon en Parizo.

Ĉu certe mia korespondantino Tereza atendos min? Ŝi promesis, sed ĉio povas okazi...

Ho, ŝi estas, ŝi staras kun tabuleto super la kapo: "Tereza, Esperanto". Do mi venis al privateca Parizo!

Tereza kun edzo bonvenigis min tre kore, prenis de mi pakajon, enmetis en sian aŭtomobilon kaj ni veturis al ilia hejmo.

Ili loĝas apud ĉefurbo en Ormesson en aparta, unuetaĝa domo kun ĝardeno bele floranta, ĉe silenta strateto kun puraj, koloraj, gajaj dometoj. Mi ricevis propran ĉambron sur la etaĝo, apud banejo. Loĝejo estas komforta, agrabla, bele meblita kun interesaj bildoj sur la muro, kun kelkaj televidiloj, videoaparato ktp...

Ni manĝis en granda manĝejo: multajn fruktojn kaj legomojn. Oni manĝis ĉion aparte: melonon, poste salaton en grandega pelvo, viandon kun terpomo, fromaĝojn, deserton kaj fruktojn. Post ĉiu plado oni purigas precize teleron per peco da bulko. Do, unu telero sufiĉas por ĉio. Dum manĝado oni trinkas puran, mineralan akvon.

Unuataĝe de mia restado geedzoj Sabatier veturigis min tra Parizo montrante ĉiujn plej gravajn konstruaĵojn, parkojn, monumentojn... Mi estis ravita.

Tereza, mia longjara korespondantino, gastigis min tre kore. Ĉiutage kunprenis min per aŭtomobilo al la urbo Créteil, kie ŝi laboras kiel instruistino en la lernejo por oficistoj, ĉe komputoroj. Do ŝi estas saĝa virino. Krome, bone konas kaj instruas Esperanton.

En Créteil mi eniradis metroon kaj veturadis al elektita loko de Parizo. Poste, kun dorsosako plena de manĝaĵo mi vagadis kaj rigardis miraklojn de tiu fama urbo. Kiam mi estis mal-

sata, mi sidigis en iu parko kaj manĝis mian tagmanĝon. Kaj poste mi kuŝis sur la benko, ripozante. Varmege ege turmentis min, okuloj doloris, sed mi ĉiutage diligente marŝis.

La filino de Tereza laboras en vartejo por etaj infanoj. Mi vizitis ŝin. Kiel komforta ejo! Ĉio pura, multkolora, belaj ludiloj, basenetoj, ĝardeno. Infanoj manĝis bongustajn pladojn en longaj salivtuketoj, kiuj parte kuŝis sub la teleroj. Tre praktike! Infanoj havas salonojn en kiuj ili pentras bildojn, manĝas, dormas kaj ludas. Mi parolis kun kuracisto kaj flegistino, kiuj zorgas sanon de infanoj. Ili multe demandis min kaj miajn respondojn tradukis Tereza de Esperanto al la franca.

Ni vizitis ankaŭ laborejon de Tereza. Tiu lernejo por laborantaj homoj estas perfekte aranĝita. Multaj vastaj salonoj, diversaj komputoroj, programoj, laborsalono por kudrado. Lernantoj povas en lernejo loĝi kaj manĝi.

Semajnfine mi partoprenis piknikon en la kamparo apud la urbo. Ni renkontiĝis kun aliaj Esperantistoj. Ni sunbruniĝis, flosis per boato, manĝis pladojn frititajn sur la fajro... Junaj virinoj el najbara tendo iradis vestitaj en "toples", tute senĝene.

Dum mia restado ni forveturis por kelkaj tagoj al la kamparo, kie loĝas patrino de Tereza. La vilaĝo troviĝas en Burgundio. Dometo estas agrabla, oportuna. Ofte ni sidigis en ĝardeno kun bela vidaĵo. Ĉiudutage veturas al vilaĝo busoj, kiuj alportas ĉiujn bezonatajn varojn. Oni povas mendi, se io mankas. Aparte ofte vizitadas lokon busoj kun bakajo. Ni vizitis onklinon de Tereza. Renkontiĝon partoprenis multaj personoj. Ni drinkis bongustan vinon, sed virinoj ricevis nur unu kalikon. Pli multe drinkis viroj. Ho, en Francio estas diskri-

minacio de virinoj! Kiam unu viro adiaŭis min, Teresa diris: "Kisu la manon de sinjorino! En Pollando estas tiu kutimo." Li ne kredis, li pensis, ke Teresa ŝercas. Sed kiam duafoje li adiaŭis min, li kisis min an manon kun rideto.

La patrino de mia amikino gastigis nin tre kore, bonguste nutris nin, invitis nin al la amusa vespero por pensiuloj, kie ni gaje ludis loterion kaj dancis, ni faris ankaŭ interesan ekskurson al lago. Do, ni, kontentaj kaj ripozintaj revenis al Parizo.

Kun Teresa mi ankoraŭ ekrigardis malnovan urbon kaj faman kastelon Versailles. Tiu lasta estas grandioza kun granda, bela parko. En ĉirkaŭaĵo de la kastelo troviĝas basenego kun fontanoj, skulptaĵoj kaj belegaj floroj. Teresa filmis min kaj gvidis tra la parko, en kiu estas multaj, interesaj konstruaĵoj prefere granda kaj malgranda palacoj Trianon.

*

Post du semajnoj venis tempo de forveturo. Feliĉe miaj gastigantoj kiel ankaŭ mi, planis vojaĝon al Anglujo. Ili kunportis min per karavano. Al kanalo La Manche ni vojaĝis tra Normandio. La pejzaĝo estis pli malgaja, sed apudmaraj vilaĝoj plaĉis al mi, kun ĉarmaj dometoj kiel ludiloj. Vespere ni alvenis al la urbo Cherbourg, kie ni tranoktis en ruldometo kaj frue matene ni forveturis per ŝipo tra La Manche al Britujo.

Ni atingis la anglan teron en la urbo Pool. Veturante laŭ la marbordo, ni admiris elegantajn, riĉajn urbojn kaj urbetojn, kun vicoj de samaj dometoj.

Posttagmese ni venis al Brajtono. Antaŭ kongresejo mi adiaŭis miajn geamikojn. Ili forveturis viziti tutan Anglion kaj mi restis en granda salono de kongresanoj.

Tuj renkontis min Teresa, mia pola koleginino, kaj ekgvidis al mia longjara angla korespondantino, Laŭra. Ŝi estas grandioza 80-jaraĝa esperantistino, kiu de kelkaj jaroj brilas en U.Kongresoj. Laŭra finis tri kursojn, kaj

estas energia, gaja, vigla virino. Komprenible ŝi jam havis lokon, kie ni ambaŭ tranoktadis dum tuta estado en Brajtono, ĉe sia amikino el Hindio, Ŝila. Ŝi loĝis kun angla edzo en tipa dometo: unuetaĝa kun duonrondaj fenestroj kaj dekliva tegmento. Antaŭ la dometo malgranda ĝardeno kun multkoloraj floroj. Ĉiutage ni vojaĝis per etaĝa buso al la kongresejo.

Ĉar Ŝila ne povis gastigi nin sabato, ni transloĝiĝis por du tagoj antaŭ la fino de la kongreso al Junulara Gastejo apud Brajtono. Mi estis agrable mirigita: la domo estis komforta, pura kun koloraj banejoj, duŝoj, odorantaj necesoj. Ni dormis en 16-lita dormejo. Junaj knabinoj, najbarinoj estis ĝentilaj, silentaj.

Apud la domo en la parko estis granda placo, kie multaj homoj ludis golfon kaj kriketon.

En la gastejo oni povis fari manĝaĵon en speciala kuirrejo, kie troviĝis ĉio bezonata en propra kuirrejo. Sur la breto kun surskribo: "por komuna uzo" kuŝis produktoj lasataj de turistoj, kiuj ne volas multe porti.

En la vilaĝo ni rigardis belajn dometojn sur montetoj kaj ĉarman rosarion en la parko.

Unufoje ni vizitis apudan muzeon el la 18-a jarcento, sidejon de aristokrata familio "Preston Manor". Vidindaj estis antikvaj mebloj, memoraĵoj, bildoj ktp. La plej interesa por mi estis subteraj ejoj por la servantoj kun malnovaj iloj por kuiri, gladi, lavi... Apud la domo estis ĝardeno kun belaj floroj kaj raraj arboj. Aparta ĝardeneto estis dediĉita al memoro de domaj katoj kaj hundoj. Tutaj vicoj de surtombejaj tabuletoj kun nomoj kaj datoj de ilia vivo, eĉ surskribo, ekz.: "Tie kuŝas unu el la plej bonaj miaj amikoj". Apude kreskis floroj. Mi miris pri tio, ĉar homaj tombejoj en Anglujo estas tre modestaj: malgrandaj tabuloj kuŝas sur la tero, sen floroj.

Post du tagoj mi kun Laŭra forveturis per la buso al ŝia urbo Huddersfield. Mi ekkonis ŝian domon kaj familion. Ili estas tre belaj, ĉarmaj, ridetantaj. En granda domo, granda familio: ŝiaj filino, bofilo, du nepoj, gekuzinoj, gekolegoj, du surdaj maljunulinoj. Ni manĝis en grandega manĝejo, tre bonguste. Plaĉis al mi precipe flukoj kun malvarma lakto, toaŝtoj, diversaj viandoj, multaj legomoj kaj fruktoj, prefere melonoj. La plej granda estis vespermanĝo.

Bofilo Devid, tipa Anglo, alta, svelta, similas Sherlook Holmes. Kiam mi diris al li tion kaj demandis ĉu li ludas violonon, li kuris kun mi al granda salono. Poste sidis ĉe la piano kaj ludis kun granda emfazo polonezon A-dur de Chopin kaj altajn verkojn de nia fama komponisto. Mi estis agrable kortuŝita. Fine li donis al mi du kasedojn kun melodioj de Chopin.

Laŭra akompanis min dum vizitado de najbaraj urboj: Halifax kaj York. Tio estas industria distrikto, do, la konstruaĵoj estas grizaj aŭ preskaŭ nigraj. Sed la urbocentroj estas belaj, modernaj.

Kiam ni veturis per etaĝa buso, junaj knabinoj fumis malgraŭ malpermeso. Laŭra riproĉis. Ili ne ĉesis fumi sed malĝentile ridis. Mi kriis al ili esperante. Preskaŭ ĉiuj ĉesis fumi. Unu el ili, kiam ili eliris el la buso, kriis al Laŭra: "Ne plaĉas al mi via ĉapelo!"

Ni telefonis al Londono kaj mi eksciis, ke en lasta tago de la kongreso mortis esperantisto Georgo, ĉe kiu mi estis loĝonta. Teresa el Varsovio, kun kiu mi telefone parolis, trovis al mi post granda peno loĝlokon ĉe la esperantista familio, kiu loĝas apud Londono. Mi ĉagreniĝis pro la morto de bonkora, ŝatata kolego.

Dum la tago de mia forveturo Laŭra kaj Devid akompanis min al la buso. Ni tre kore adiaŭis, ĉar mi sincere ekŝatis tiun grandiosan familion. Laŭra donis al mi manĝaĵon, por ke mi ne estu malsata en Londono. Baldaŭ mi forveturis sola kaj timanta. Teresa

kun mia nova gastigantino Maria estis atendontaj min en la stacidomo Viktoria en Londono. Dum la vojo mi havis malgrandan aventuron. Buso haltis kaj longe staris. Konduktorino laŭte ion diris. Mi komprenis nenion. Finfine mi ekstaris kaj demandis pole: "Ĉu iu komprenas la polan lingvon?" Neniu. "Ĉu vi parolas esperante?" Neniu. "Parlez-vous français?" "Oui" respondis juna fraŭlino. Kaj ŝi diris al mi, ke post duonhoro venos dua buso kaj prenos nin al Londono. Tiel okazis.

Post mia veno al Viktoria, Teresa kun Maria jam atendis min. Mi, feliĉa, ĉirkaŭbrakis ilin. Maria estas franca Polino. Ŝi naskiĝis en Francio. Jam kiel Esperantistino ŝi venis al esperanto-aranĝo en Grésillon. Ŝi tie ekkonis altan Anglon kaj post nelonge ekestis lia edzino. En la stacidomo ŝi prenis min sub siaj plumoj kaj veturigis al sia dometo en Croydon, urbo apud Londono.

Mi pasigis tutan semajnon en ilia gastema domo. Mi havis apartan ĉambron sur la etaĝo kun tre mola, vasta lito. La loĝejo estis komforte kaj agrable aranĝita, kun ses televidaparatoj kaj video. Malgranda ĝardeno kun belegaj rozoj estis antaŭ la domo. Malantaŭe troviĝis pli granda ĝardeno kun fruktarboj kaj legomoj. Oni sentis, ke Maria estas estas Polino: ŝi preparadis tre abundajn, bongustajn pladojn.

Ili estis pensiuloj, laŭ profesio ĝeinstruistoj de matematiko kaj fiziko. Edzo granda, balstatura, kun forta voĉo, iom timigis min. Lia hobbio estas instruado de Esperanto. Li faris mem diversajn helpilojn por lernantoj. Li montris al mi filmon el U.K. en Varsovio kaj donis kelkajn ludilojn por pli interese instrui.

Ĉiutage mi vojaĝis per trajno al stacidomo Viktoria, kie atendis min Teresa, kaj poste per metroo ni veturis al diversaj partoj de la

grandega Londono. Kun plano de urbo kaj metroo ni vizitadis tiun faman ĉefurbon. Londono havas partojn tre belajn kaj elegantajn, sed ankaŭ malbelajn, grizajn, malpurajn. Posttagmeze mi revenadis al Croydon por manĝi vespermanĝon kun miaj esp. geamikoj.

Iutage vizitis ilin du junaj ĵurnalistoj kaj faris intervjuon pri ilia esperanta agado. Ili speciale venis en la tago de la 25-datreveno de ilia geedziĝo. Ni tial drinkis bongegan vinon kaj diskutis pri Esperanto. Ili ankaŭ faris fotojn.

Foje mi vizitis anglan E-Asociion en la urbocentro. Ĝuste estis tre solena vespero kun multnombraj eksterlandanoj, kiuj restis en Londono post la U.K. Ĉiuj multe diris pri sia kologo, Georgo, maljuna homo, kiu mortis dum la kongreso. Li estis tre afabla, bonkora kaj ofte gastigis Esperantistojn en sia granda domo apud Londono. Vesperon gvidis prezidento de L.E.A., kiu laste estis elektita kiel prezidento de U.E.A. Tre agrabla, gaja, belstatura homo. En la bufedo oni povis aĉeti kafon, teon, dolĉaĵojn kaj E-librojn. Post la paŭzo partoprenantoj proponis temojn. Ĉiuj tre multe diris. Mia mastro invitis Brazilianon kaj Pakistananon al sia hejmo. Vespero estis tre interesa. La Braziliano parolis pri regiono de Bona Volo, kiu estas tre populara en lia lando. Poste ni man-

ĝis tre bongustan vespermanĝon.

Unutage ni veturis tra la urbo Croydon. La ĉefa strato estas elegantaj kun grandegaj magazenoj, bele aranĝitaj kun speguloj, belegaj plantoj, fontanoj kaj varoj... pli bone ne paroli... En la parko estas floroj kiel tapiŝoj kun diversaj modeloj. La herbo estis seka kaŭze de grandaj varmegoj. En Anglujo multaj homoj kuŝas en la parkoj sur herbo, apud la arboj, kaj ripozas.

Fine venis tempo de mia forveturo el gastema Anglujo. Al la flughaveno akompanis min Maria, donante al mi multe da manĝaĵo, fruktoj, teon kaj kafon, por ke mi ne estu malsata, konante la malbonan situacion en nia lando. Bona Maria. Kiam ni estis en la flughaveno, ni vidis sur ĉiuj gazetoj grandajn fotojn de Lech Wałęsa. Li ĵus preparis elekton de nova Pola registaro.

Post nelonga tempo mi jam estis en Varsovio, kiu bonvenigas min per nekutima varmego. Mi revenis sufiĉe laca, sed plenplena de agrablaj, grandiozaj memoroj el mia la plej bela en mia vivo vojaĝo.

Teresa Jankowska



Marcel AYMÉ

Elfrancisgis : P.S.

LA EKZEKUCIISTO

el la novelaro "La murtranspasulo"

En malgranda urbeto de Francio vivis iu ekzekuciisto nomata Malikorno, kiu estis tiel skrupulema en la plenumado de sia malgaja ofico, ke li estus senhezite konfiskinta la proprajn meblojn, sed ne prezentigis tia situacio, kaj cetere la leĝo onidire malpermesas, ke ekzekuciisto aktumu kontraŭ si mem. Iun nokton, dum li kuŝis ĉe sia edzino, Malikorno mortis dormante kaj estis tuj allasita antaŭ Sanktan Petron, kiu juĝas unuainstance. La eminenta ŝlosilportanta sanktulo akceptis lin malvarme.

- Via nomo estas Malikorno kaj vi estas ekzekuciisto. Ili ne multas en paradizo.

- Ne gravas, respondis Malikorno. Mi ne aparte deziras esti kun kolegoj.

Dum li prizorgis la instalon de grandega kuvo, ŝajne plena de akvo, kiun ĵus alportis trupo de anĝeloj, Sankta Petro ironie ekridetis.

- Laŭŝajne, ulo, ne mankas al vi iluzioj.

- Mi nur esperas, diris Malikorno, nenio pli. Cetere mi sentas min kun konscienco sufiĉe trankvila. Konsentite mi estas abomeninda pekulo, vazo de maljustaĵoj, malpura fiinsekto. Sed krom tio, tamen veras, ke mi iam ajn maljustis al neniu je eĉ unu centimo, ke mi akurate ĉeestis la meson kaj ke mi plenumis la devojn de mia ofico kontentigante ĉiujn.

- Ĉu vere? diris Sankta Petro. Rigardu do tiun kuv-

egon, kiu ĵus suprenvenis ĉielen kune kun via lasta spiro. Kion ĝi entenas, laŭ vi?

- Mi tute ne scias.

- Nu, jen! Ĝi plenas je larmoj de vidvinoj kaj orfoj, kiujn vi senigis je ĉia espero.

La ekzekuciisto konsideris la kuvon kaj ĝian amaran enhavon kaj sen embaraso replikis :

- Povas esti. Kiam vidvino kaj orfoj estas malbonaj pagantoj, necesas efektivi la meblan forprenon. Tio farigās ne sen plorado kaj grincado de la dentoj, kiel vi ja povas imagi. Tial ne estas mirige, ke la kuvo plenas. Dank' al Dio, miaj aferoj prosperis kaj mi ne estis senlabora.

Tiom da trankvila ciniko indignigis Sanktan Petron, kiu ekkriis turnante sin al la anĝeloj:

- Inferen tuj! Oni provizu al li bonan fajron kaj oni ĉiamigu liajn brulvundojn poreterne, priverŝante ilin dufoje en ĉiu tago per la larmoj de vidvinoj kaj orfoj.

Jam urĝis sin la anĝeloj. Malikorno haltigis ilin per tre decida gesto.

- Minuton! li diris. Mi apelacias al Dio kontraŭ tiu maljusta juĝo.

Proceduro estas proceduro. Furioza Sankta Petro devis prokrasti la ekzekucion de la verdikto. Dio ne atendigis ilin longe kaj, anoncote per tondro, envenis sur nubo. Ankaŭ li ŝajnis ne multe korfavori la ekzekuciiston. Evidentigis tion la grumbla maniero, laŭ kiu li demandis Malikornon.

- Dio mia, respondis tiu ĉi, jen la afero. Sankta Petro imputas al mi la larmojn de la vidvinoj kaj orfoj, kiujn mi fluigis dum la plenumado de mia ofico, kaj li verdiktis, ke tiuj brulaj larmoj estu la ilo de mia eterna turmento. Tio estas maljustaĵo.

- Evidente, diris Dio, sin turnante al Sankta Petro kun severa frunto. Ekzekuciisto estas nur la brako de iu homa leĝo, pri kiu li ne respondecas, kiam li forprenas la meblojn de malriĉulo. Tiun li povas nur kompati en sia koro.

- Sed ĝuste ne tiel! ekkriis Sankta Petro. For ke li dediĉus bonkoran penson memore al siaj viktimoj, antaŭ momento tiu ĉi viro parolis pri ili kun abomena gajeco

kaj el tio li cinike plezuriĝis.

- Tute ne, replikis Malikorno. Mi plezuriĝis, ke mi ĉiam estis akurata en plenumado de mia ofico kaj ankaŭ, ke laboro neniam mankis al mi. Ĉu do estas krimo ami sian metion kaj praktiki ĝin bone?

- Ĝenerale ne estas krimo, koncedis Dio, eĉ male. Via kazo estas sufiĉe aparta; nu, bone, mi bonvolas agnoski, ke la juĝo de Sankta Petro estis tro hasta. Nun ni ekzameni viajn bonfarojn. Kiuj ili estas?

- Dio mia, kiel mi diris antaŭ momento al Sankta Petro, mi mortis ŝuldanta monon al neniu kaj ĉiam akurate mi ĉeestis la diservojn.

- Kaj ĉu pli?

- Ĉu pli? Nu, mi memoras, ke antaŭ dekkvino da jaroj, elirante el preĝejo post la meso, mi almozdonis dek centimojn al iu malriĉulo.

- Tio veras, rimarkigis Sankta Petro. Temis cetere pri falsa monero.

- Pri tio ne zorgu, diris Malikorno. Li certe elturnigis por ĝin ŝovi.

- Ĉu el tio konsistas via tuta aktivo?

- Dio mia, mi malbone memoras. Oni diras, ke mano dekstra ne sciu, kion faras la maldekstra.

Oni tro facile povis kontroli, ke ĉi tiuj belaj deklaroj kaŝis nenian bonfaron, nenian bonan penson, per kiuj povus sin pravigi animo antaŭ la plej supra tribunalo. Dio aspektis tre ĉagrenita. Parolante hebree por ne esti komprenata de la ekzekuciisto, li diris al Sankta Petro :

- Pro via hastemo, jen ni venis en embarason. Sendube tiu ekzekuciisto estas ne tre rekomendinda ulo, kiu havus en infero sian ĝustan lokon, sed mistrafa estis via akuzo kaj plie, vi grave ofendis lin en lia profesia fiero. Ni ŝuldas riparon al li. Kaj nun, kiel mi traktu lin? Mi tamen ne povas malfermi antaŭ li la pordojn de la paradizo. Tio estigus grandan skandalon. Nu, kion?

Sankta Petro plu silentis. Se nur de li dependus la afero, la sorto de la viro estus tuj decidita.

Lasante lin en lia gala humoro, Dio sin turnis al Malikorno kaj en pure franca lingvo alparolis lin:

- Maliculo vi estas, sed la eraro de Petro vin savas.

Ne estas allaseble, ke vi evitis la inferon por refali en la inferon. Ĉar vi estas malinda eniri la paradizon, mi resendas vin sur la teron, ke vi daŭrigu vian ekzekuciistan karieron kaj provu kapti ŝancon elaçeti vin. Iru kaj elprofitu tiun prokraston, kiu estas al vi konsentita.

La morgaŭon matene, vekigante apud sia edzino, Malikorno povus supozi, ke li songis, sed li ne faris al si iluziojn kaj ekpripensis la rimedojn certigi sian saviĝon. Pri tio li ankoraŭ pensis enirante sian oficejon, je la oka matene. Lia aktisto, la olda Ostrokorb, kiu de tridek jaroj kunlaboris kun li, jam sidis ĉe sia skribotablo.

- Ostrokorb, enirante diris la ekzekuciisto, mi altigas po kvindek frankoj vian monatan salajron.

- Vi estas tro bonkora, sinjoro Malikorno, protestis Ostrokorb, kunigante la manojn. Multan dankon, sinjoro Malikorno.

Ne tuŝis la ekzekuciistan koron la esprimo de tiu ĉi dankemo. El ŝranko li tiris tutnovan kajeron kaj per vertikala streko li dividis la unuan paĝon en du kolumnojn. Kape de la maldekstra, li kaligrafis graslitere ĉi tiujn vortojn: "Malbonaj agoj" kaj en la dua, vidalvide: "Bonaj agoj". Li rezolute decidis, ke li estos rigora kontraŭ si mem kaj forgesos nenion ajn, kio povus atesti malfavore al li. Kaj jam en tiu senkompleze justa spiritostato li ekzamenis sian konduton dum la frumatena hodiaŭo. Li trovis nenion por registri en la maldekstran kolumnon kaj en la fakon de la bonaj agoj li enskribis: "Spontane mi altigis je pokvindek frankoj la monatan salajron de mia aktisto Ostrokorb, kvankam tion li ne meritis."

Ĉirkaŭ la naŭa, lin vizitis sinjoro Gorgumo, lia plej bona kliento. Tiu estis riĉa proprietulo posedanta kvardek du loĝdomojn en la urbo kaj kiun monmanko ĉe kelkaj el liaj luantoj devigis ofte uzi la servojn de Malikorno. Ĉi-foje li venis por sciigi tiun pri monbezona familio, kiu malfruis en la kvitigo de jam du lupagoj...

- Pli longe mi ne povas atendi! Jam ses monatojn mi kontentiĝis per promesoj. Tio ĉesu!

Kvankam malinkline, Malikorno tamen klopodis pledi la aferon de tiuj malbonaj luantoj.

- Mi demandas min, ĉu ne estus al vi pli profite kon-

senti al ili plian pagprokraston. Iliaj mebloj ne valoras unu kopekon. La enspezo post vendo ne kovrus la dekonon de la ŝuldo.

- Tion mi ja scias, ĝemis Gorgumo. Mi estis tro bonkora. Oni ĉiam estas tro bonkora. Bonkorulon tiaj homoj lertas ekspluati. Ĝuste pro tio, mi venas peti vin fari ĉion necesan. Memoru, ke mi havas cent kvindek unu luantojn. Se disfamiĝus la bruo, ke mi estas bonkora, prosperus al mi enkasigi eĉ ne la duonon de miaj luprezoj.

- Evidente, konsentis Malikorno. En kio ajn endas konsideri la celon. Sed trankviligu, sinjoro Gorgumo. Mi, kiu rilatas kun multaj homoj, neniam kaj nenie aŭdis, ke vi estas bonkora.

- Des pli bone, ĉu?

- Iel, eble jes, fakte.

Malikorno ne kuraĝis finesprimi sian penson. Li revis pri la komforta situacio de pekulo alvenanta antaŭ la dian tribunalon kun la akompano de tuturba rumoro atestanta pri lia bonkoreco. Rekondukinte sian klienton ĝis la pordo, li rekte iris en la kuirejon kaj, en ĉeesto de la mirkonsternata edzino, li diris al la servistino:

- Melania, mi altigas vian monatan salajron je po kvindek frankoj.

Sen atendi la dankojn, li revenis oficejen kaj skribis en la kajero, en la kolumno "Bonaj agoj": "Mi spontane konsentis pokvindekfrankan monatan plipagon al mia servistino Melania, kvankam ŝi estas vera Malitorna."

Ĉar restis nenies salajro por plialtigi, li iris en la malaltaj kvartaloj de la urbo, kie li vizitis plurajn malriĉajn familiojn. Ne sen timo, la homoj vidis lin eniri kaj ili ekakceptis lin kun malamika deteniĝemo, sed li rapidis trankviligi ilin kaj forirante lasis kvindekfrankan bileton. Generale, kiam li estis for, liaj dankoŝuldantoj enpoŝigis la monon grumblante: "Olda ŝtelisto (aŭ olda murdisto, aŭ olda avarulo), li ja povas almozdoni per la mono, kiun li rabis el nia mizero." Sed tio estis nur paroloj, dece maskantaj radikalan opiniŝanĝon.

En la vespero de sia releviĝo, Malikorno estis jam registrinta en sia kajero dek du bonajn agojn, kiuj kostis al li sescent frankojn, kaj eĉ ne unu malbonan. La mor-

gaŭon kaj la postajn tagojn, li plu disdonis monon al bezonantaj familioj. Li devontigis sin plenumi, ĉiutage, plimalpli dek du bonajn agojn, nombron, kiun li altigis ĝis dek ses aŭ dek sep, kiam la hepato aŭ la stomako kaŭzis al li zorgojn. Ja tiel ekzemple, unu pena digestado de la ekzekuciisto havigis denovan kvindekfrankan plipagon al Ostrokorb, kiu, ankoraŭ antaŭ nelonge, ege timis tiaspecajn malsanetojn, el kies sekvoj li preskaŭ ĉiam viktimiĝis.

Ne eble, ke tiom da bonfaroj okazis nerimarkate. Disfamigis en la tuta urbo, ke Malikorno preparas al si la vojon al ia elekta kandidateco, ĉar de tro longe oni konis lin, ol ke oni kredu, ke li tiel kondutas pro nura oferemo. Lin trafis momenta senkuraĝiĝo, sed pripensinte la gravecon de la celo, li tre baldaŭ revigligis kaj multigis la bonfarojn. Anstataŭ limigi sian malavaran almozdonemon al privatuloj, li ekhavis la ideon fari donacojn al la fondaĵo de la Patroninoj de la urbo, al la pastro de sia paroĥo, al mutualaj helpsocietoj, al la Fajrobrigada Frataro, al la Amikaro de la ekslernantoj de la kolegio kaj al ĉiuj institucioj, religiaj aŭ ne, fonditaj sub la aŭspicio de iu influa persono. En kvar monatoj, li tiel elspezis la dekonon de sia havaĵo, sed lia reputacio estis firme starigita. Oni citis lin en la tuta urbo kiel modelon de bonkoreco kaj lia ekzemplo montriĝis tiel kontaga, ke donacoj komencis alflui el ĉiuj flankoj al la filantropiaj entreprenoj, tiel ke la estraraj komitatoj povis organizi multajn bankedojn, kie la manĝo estis fajna, abunda, kaj dum kiuj oni prononcis edifajn parolojn. Eĉ la malriĉuloj jam ne avaris sian dankemon al Malikorno, kies bonfaremo iĝis proverba. Oni kutimiĝis diri: "Bona kiel Malikorno", kaj ofte okazis, eĉ pli kaj pli ofte, ke tiun esprimon kvazaŭ senpripense oni anstataŭigis per alia, tiel surpriza kaj nekutima, ke ĝi sonis al fremdaj oreloj kiel ŝerco iom provoka. Oni diris efektive: "Bona kiel ekzekuciisto."

Al Malikorno restis nur flegadi tiun sian reputacion kaj do, persistante en siaj bonfaroj, li atendis kun trankvila koro, ke Dio volu revoki lin al si. Ĉiufoje kiam li alportis donacon al la fondaĵo de la Patroninoj, la prezid-

antino, S-ino de Sankta-Onufro, ripetis al li kun korvarmo: "Sinjoro Malikorno, vi estas sanktulo." Tiam li protestis kun humileco: "Ho! Sinjorino, sanktulo, mi?...Tio estas troa. De sankteco mi estas ankoraŭ tre fore."

Lia edzino, dommastrino praktika kaj ŝparema, trovis ke tiu tuta bonfaremo kostas multe. Ŝi aspektis tiom pli incitita, ke la veran kialon de tiu malavareco ŝi klare komprenis. "Vi aĉetas vian porcion de paradizo, ŝi diris sufiĉe krude, sed vi donas neniom por la mia. Mi ja rekonas en tio vian egoismon." Malvigle protestis Malikorno, ke li donacas por la sola plezuro donaci, sed la riproĉo lin tuŝis kaj, ĉar lia konscienco ne estis en paco, li permesis al la edzino fari ĉiujn elspezojn, kiujn ŝi rigardos utilaj por meritigi al ŝi la ĉielon. Tiun malavaran proponon ŝi rifuzis kun indigno kaj li ne povis malhelpi, ke el tio li ricevis grandan senpezigon.

Post unu jaro, la ekzekuciisto, kiu plu registris siajn bonajn agojn, estis per ili pleninginta ses perlernejajn kajarojn. Ĉiumomente li eligis ilin el ilia tirkesto, mane pesis ilin kun feliĉo kaj kelkfoje ilin longe foliumis. Nenio efikis pli kuraĝige ol la vido de ĉiuj ĉi tiuj paĝoj, kie la bonaj faroj enlistiĝis en densajn vicojn, apud larĝaj blankaj marĝenoj, kiuj preskaŭ ĉiuj virgis je malbonaj agoj. Malikorno, kun antaŭgusto de beateco, revadis pri la horo, kiam li altribuniĝos ŝarĝite per tiu impona bagaĝo.

Iun matenon, konfiskinte la meblojn de iu senlaborulo, la ekzekuciisto, dum li paŝis tra la stratetoj de la malalta kvartalo, sentis sin malserena kaj dubanta. Estis speco de necerteco, korporema kaj melankolia, ne rilatanta al iu preciza objekto kaj tia, kian li ne memoris esti iam ajn spertinta. Tamen sian devon li estis plenumanta sen timo kaj vana kompato kaj post la ekzekucio, almozdonante al la senlaborulo kvindekfrankan monbileton, li eĉ ne sentis emocion. En la strato de la Poterno, li transiris la sojlon de malnova domo de mizero, malseka kaj haladza, apartenanta al lia kliento, S-ro Gorĝumo. De longe li konis ĝin, tial ke li ekzekuciis kontraŭ pluraj tieaj luantoj, kaj la hieraŭon li jam venis tien disdoni kelke da almozoj. Restis al li por viziti la tria etaĝo. Trairinte malluman koridoron kun gluecaj muroj kaj grimpinte tri

ŝtuparojn, li eniris en strangan helon de subtegmento. La tria kaj lasta etaĝo estis prilumata sole de unu luko malfermiĝanta en kavo de la mansarda tegmento. Malikorno, iom senspira pro la grimpo, haltis momenton, ekzamenante la lokon. Pro konstanta malsekeco, la gipso de la vandoj ŝvelis en vezikojn, el kiuj pluraj jam krevis lasante aperi, kvazaŭ en fundo de absceso, la lignon nigran kaj putran de ĉevrono aŭ lataĵo. Sub la luko, fera pelvo kaj tukaĉo kuŝis rekte sur la planko, kiun ili verŝajne ne sufiĉe ŝirmis kontraŭ la enlikiĝanta pluvakvo, ĉar ĝi estis rongita kaj ŝima kaj havis kelkloke kvazaŭ tapiŝan ŝvelmolon.

Nek la aspekto de tiu malhela kaj eta placeto, nek la naŭza mucido, kiun oni tie flaris, povis iel ajn surprizi la ekzekuciiston, kiu dum sia kariero jam spertis pli malbonan. Tamen, lia maltrankvilo fariĝis tiam pli lancina kaj ŝajnis al li, ke ĝi baldaŭ havos signifon. Li aŭdis infanon plori en unu el la du loĝejoj elirantaj sur la placeto, sed li ne povis rekoni kun certeco, de kiu flanko venas la voĉo, kaj hazarde li ekfrapis ĉe unu el la du pordoj.

La loĝejo konsistis el du sinsekvaj ĉambroj, koridore mallarĝaj, kaj la unua, ricevanta lumon nur tra la intera vitropordo, estis eĉ pli obskura ol la placeto. Maldika virino, kun vizaĝo tre juna sed laca, akceptis Malikornon. Infano dujara staris ĉe ŝia jupo, la okulojn malsekaj, rigardante la vizitanton kun scivolo, kiu jam forgesigis al li lian ĉagrenon. La dua ĉambro, en kiun estis enkondukita la ekzekuciisto, estis meblita per sensomiera lito, eta tablo el ĉipa ligno, du seĝoj kaj malnova stebmaŝino lokita antaŭ la mansarda fenestro, kiu donis vidon al tegmentoj. Ankaŭ la mizero de tiu hejmo montris nenion alian ol tion, kion li jam vidis iam aliloke, sed hodiaŭ, unufoje en sia vivo, Malikorno sentis sin senaplomba enirante ĉe malriĉulo.

Kutime liaj bonfaraj vizitoj estis ege mallongaj. Sen sidiĝi li metis kelkajn precizajn demandojn, elbobenis kuraĝigan banalaĵon kaj, lasinte sian almozon, tuj foriris. Ĉi-foje, li jam ne sciis tre klare, kial li venis, kaj eĉ ne pensis elpoŝigi la monujon. Al li tremis en la kapo la ideoj, kaj sur la lipoj, la vortoj. Pensante pri sia ekze-

kuciista profesio, li apenaŭ kuraĝis levi la okulojn al la eta kudristino. Koncerne ŝin, ne malpli senaplomba ŝi estis, kvankam lian reputacion de bonfarema persono ŝi konis jam de longe. La infano, preskaŭ sola, nutris la konversacion. Komence timema, li baldaŭ iĝis pli konfida kaj propramove grimpis sur la genuojn de Malikorno. Ĉi tiu bedaŭris tiel forte ne havi bombonojn, ke li eksentis preskaŭ ploremon. Subite aŭdiĝis kruda frapo ĉe la pordo, kvazaŭ bastonbatoj. Forta emocio videble skuis la kudristinon kaj ŝi iris en la alian ĉambron, kies interan pordon ŝi fermis post si.

- Nu, do! diris aroganta voĉego, kiun Malikorno rekonis kiel tiun de Gorĝumo. Nu! Espereble hodiaŭ estas fine la ĝusta tago!

La respondo la ekzekuciisto aŭdis kiel obtuzan murmuron sed la senco estis ja facile divenebla. Gorĝumo ekblekis per terura voĉo, kiu timigis la infanon kaj verŝajne plenigis la tutan domon:

- Aĥ ne! Sufiĉe tiel! Vi ne plu pagos min per vortoj. Mian monon mi volas. Donu al mi mian monon, tuj! Nu, ek! Montru kie vi kaŝas vian ŝparaĵon. Ĝin mi volas vidi.

En alia tempo, Malikorno estus admirinta estiel spertulo, kiel vigle Gorĝumo kondukis tiun malfacilan taskon, kiun konsistigas la enkasigo de lupago ĉe malriĉuloj. Sed lin premis tiu sama sento de timo, kiu igis bategi la koron de la infano rifuĝinta en liajn brakojn.

- Nu! Eligu vian monon, kriegis Gorĝumo. Donu ĝin, aŭ mi ja scios ĝin trovi!

La ekzekuciisto leviĝis kaj, demetinte la infanon sur la seĝon, iris en la alian ĉambron sen preciza intenco.

- Ej! ekkriis Gorĝumo. Ĝuste pri lupoj mi pretis rakonti kaj jen la lupoj renkonte.

- Foriru! ordonis la ekzekuciisto.

Konsternite, Gorĝumo konsideris lin per stultaj okuloj.

- Foriru! ripetis Malikorno.

- Sed... vi freneziĝas. Mi estas la proprietulo.

Efektive Malikorno freneziĝis, ĉar li impetis al Gorĝumo kaj pelis lin el la loĝejo, kriante plengorĝe:

- Vi, fiporka proprietulo, jes ja. For la proprietulojn! For la proprietulojn!

Rigardante sin en danĝero de morto, Gorĝumo elpoŝigis revolveron kaj, celante la ekzekuciiston, forpafis lin morta sur la placeto, inter la pelvo kaj la tuko.

Dio hazarde trairis la aŭdiencejon, kiam estis enkondukita Malikorno.

- Ha! li diris, jen denove nia ekzekuciisto venas. Nu! Kiel li do kondukis?

- Verdire, respondis Sankta Petro, mi vidas, ke lia konto estos baldaŭ reguligita.

- Nu, ni vidu liajn bonfarojn.

- Prefere ne paroli pri liaj bonfaroj. Nur unun li havas en sia aktivo.

Ĉi tiam Sankta Petro konsideris Malikornon kun milda rideto. La ekzekuciisto volis protesti kaj antaŭmeti ĉiujn bonajn agojn registritajn en liaj kajeroj, sed la sanktulo ne lasis al li la parolon.

- Jes, nur unu bonan agon, sed ĝi multe pezas. Li, ekzekuciisto, li ekkriis: "For la proprietulojn!"

- Kiel bela! murmuris Dio. Kiel bela!

- Li ĝin kriis dufoje kaj pro tio li mortis en la momento mem, kiam li defendis malriĉulinon kontraŭ la krueleco de ŝia domposedanto.

Dio, admireganta, ordonis al la anĝeloj, honore al Malikorno ludi liuton, vjolon, hoboĵon kaj flaĝoleton. Poste li malfermigis larĝe la pordojn ĉielajn, kiel decas por la malfeliĉaj, la trampoĵoj, la mizeruloĵoj kaj la mortkondamnitaj. Kaj portate de aria melodio la ekzekuciisto eniris paradizen kun lumrondo super la kapo.

INVITO ĈE LA VOJNODO

Por tiuj, kiuj aspiras harmonian kunvivadon kun la aliaj kaj kun la naturo, okazos de la 1-a ĝis la 10-a de julio 1990, amika renkontiĝo, "Ĉe la vojnodo", nova esperanto-centro en suda Belgio. Petu detalan informilon:

"Ĉe la vojnodo"

Rue de Givet, 68

B-5540 Hastière-Lavaux

Respondo al Kamaradino Jakelino

Mi dankas al vi pro la atento, kiun ĝuis mia libro "Sennaciece tra nia mondo"... kaj sendube ĝi ne meritis tiom longan komenton.

Mi efektive dediĉis ekzempleron al vi pro via kuraĝo esprimi viajn pensojn, pro via sendependeco, kaj ĝuste pro la oftaj polemikoj en la kolumnoj de *Laŭte* pri la ideoj kun sennacieco, naciismo, rasismo ktp. Ĉar mia libro pritraktas kelkajn aspektojn de tiuj temoj, estis maniero transdoni al vi miajn personajn poziciojn... nur tion mi celis.

Mi kredas, ke vi ankoraŭ ne plene komprenis miajn vidpunktojn, kaj ofte en via letero vi iel fuĝis de la temo. Mi do provas alĝustigi kelkajn punktojn kvankam ne tiom longe kiel vi. Evidente mi neniun pretendas konverti... kiel ĉiuj jam scias, la konvinko estas nur mia, kaj ĉiu devas havi sian propran.

Sennacieco sen konfuzo

Vi pravas, multaj homoj konfuzas la nociojn pri nacio kaj ŝtato. Tio eble okazas, ĉar la monstro ŝtato bezonas naciismon por fortigi sin, kaj sendube la nacioj estus tre malfortaj sen ŝtatismo. Mi ne kredas, ke tiu konfuzo aplikiĝas al Lanti,... kaj al mia libro, al mi mem. Mi jam publikigis sufiĉe da artikoloj pri tio en *Sennaciulo*, en *Monato*, ktp. Ekzemple legu mian kunlaboron en la 33-a, 34-a kaj 35-a ĉenletoj de *Laŭte*, legu mian artikolon: "Pensi globe, agi loke... aŭ inverse" en *Monato*, februaro/90. Mi kredas, ke la nocioj estas klaraj. Mi ripetas, la ideo pri "sennacieco", kiu estas samtempe ideo pri senklaneco, senreligiigo, baziĝas sur la ekvivalenteco de la homaj bezonoj kaj valoroj en la tuta mondo, sendepende de nacioj, rasoj, religioj... sekve kulturoj, tradicioj, kutimoj ktp. Laŭ mi tio estas tre klara, ĉu ne estas? La sennacieco ne celas detrui la ekzistantajn homajn valorojn sed interplekti ilin, por ke ni atingu superan stadion de homkulturo, kiu kapablas konduki al pli alta grado de homa harmonio. Mi scias, temas pri utopio, sed tio estas propra al idealistoj kiel mi.

Pri la "amo" al la naskiĝloko, bazo de naciismo kaj patriotismo, ni jam skribis tro. Mi aldonas, ke mi tre ŝatas ĉiujn folkloriĝojn same la vaskajn kiel la alzacajn, mi nur ne ŝatas, ke la vaskoj kaj alzacanoj diras, ke iliaj folkloriĝoj estas la plej bonaj de l' mondo!... estas ĉi tiu socia ŝovinisma fenomeno de naciismo, kiun mi kondamnas.

Via komparo de ekzisto de nacioj al ekzisto de sekso, estas mistrafa : nacio estas socia fenomeno, kreaĵo de la homoj, - sekso ne... ĝi estas ekzemplo de naturleĝo, ne ŝanĝebla de la homoj, krom ĉe kelkaj gejoj.

Homa mistikemo kaj religioj

Vi grandparte pravas, kiam vi diras, ke la mistikemo estas tiom granda ĉe ateistoj, kiom ĉe dikredantoj. Ankaŭ mi tion konstatis. La mistikemo apartenas al la homo... bedaŭrinde. Ateismo estas alia afero. Kiel mi jam klarigis al (inter aliaj) mia amiko Ergoto de Bonaero, mia menso tutsimple ne sukcesas sorbi la mistikajn klarigojn, pensojn, ĝi restas hermetika al diaj elvokoj... kaj tion mi preskaŭ bedaŭras, ĉar mi apartenas al kondamnita "nenormala" minoritato de eble nur 1% !... sed kion fari, se la tutpotenca Dio ne iluminis min? En la socio, ne estas grava la fakto, ke oni kredas, aŭ ne kredas pri Dio. La grava problemo estas la religioj kiel socia fenomeno, kiuj estas fakte "la opio de l'popoloj" kaj servas kiel manipuliĝoj de la malfortaj homaj mensoj... ĝis la konfliktoj, ĝis la ekspluatadoj, kiujn ni ĉiuj konas.

Unu fojon plian vi pravas, kiam vi diras, ke la raciistoj bezonas pli da klarigoj pri ĉio ekzistanta ol la dikredantoj. Efektive, la dikredantoj estas kontentaj kun la alegorioj, simboloj, paraboloj de la biblioj aŭ koranoj, ili postvivos eterne en iuj paradizoj aŭ reenkarigiĝos laŭplaĉe en pliaj vivoj... tiajn konsolojn fakte ne havas la ateistoj aŭ aliaj raciistoj!

Mistiko kaj racio

Ĉiu kaj ĉiuj el ni, feliĉe, se ni estas ekvivalentaj, similaj, ne estas samaj kaj egalaj, vi ekzemple kiel mistikema homo, ŝatas la abstraktaĵojn, kiel filozofion, sociologion, psikologion ks., mi, eble pli raciema, preferas

natursciencojn, teknologiojn ktp. Ĉio fakte estas relativa, kaj la vera vero neniel povas ekzisti, nek pere de mistika pensmaniero, nek pere de racia pensmaniero... tamen devus ekzisti la "homkonforma" pensmaniero, kiu povus konduki al "homkonforma" agado. Estas ĝuste tio, kion franca pensulo Guy Sarram espris en tre interesa libro, kies titolo estas : "Les vrais penseurs de notre temps", same Bruno Vogelmann, en "La nova realismo" skribis en tiu direkto. Bedaŭrinde oni ankaŭ konstatas, ke en la homa evoluo, kie sufiĉe da materiala plibonigo (preter konsumismo) okazis, nur la racio iom helpis, male la mistiko ne evoluis, la biblioj estas la samaj kiel antaŭ 25 jarcentoj... kaj estas tiuj abismoj en evoluo, kiuj estas la kaŭzoj de niaj homaj kaj sociaj konfliktoj. Tiu konvinko ĉi-foje ne estas nur mia.

Revene al mia libro, same kiel vi, pluraj homoj kritikis miajn pli ol 500 km-ajn veturadojn sen homkontaktoj. Mi devas do klarigi, ke mi fidas multe pli al miaj okuloj kaj oreloj ol al vortoj ĝenerale senenhavaj de normala babilanto... ankaŭ de gurdemaj esperantistoj. Kompreneble mi restas en mia profesia sinteno de fabrikanto de manekenoj, mi ne diskutas pri gustoj kaj koloroj... de homoj. Longaj babiladoj, diskutadoj iritas mian menson.

Kiel iama "ekzistadisto" mi neniam dubis pri la fakto, ke vi ekzistas, des pli ke vi pensas, ke vi "estas", kaj neniam mi kuraĝus, kamarade aŭ ne, saluti vin aliel ol "plej dece", eĉ se laŭ viaj konfesitaj suferiĝoj vi ne estas plu tiel, kiel oni povus pensi, ke vi povus esti (sen malbonintencaj aludoj, ĉu ne?).

Ĝis la venonta.

G.R.LEDON

DONACIOJ POR LA MUELEJO :

D.C. 1000, C.S. 1000, T.P.100, P.C. 100. Sume : 2200 FF
E.B. 1000 D.M.

DONACIOJ POR LA PRESILO (Aŭgusto la Dua!) :

G.L. 200, J.L. 1000, R.D. 400. Sume : 1600 FF

Dankon al tiuj gemalavaruloj, dank'al kiu plu progresas niaj pres-rimedoj kaj la loĝebleco en la Laŭtejo!

la venonta numero aperos komence de septembro

LORULOT, prototipo de ateisto

Kun Andreo Lorulot mi neniam persone rilatis, neniam renkontis lin dum lia vivo. Sed li estis granda amiko de mia amiko Klaŭdius, de Han Riner kaj de mia kara Georgo Vidal. Tra tiuj personoj mi konis lin, mi preskaŭ povus diri ankaŭ tra liaj kutimaj kontraŭuloj, kiel la fama pastro Viollet, kiun mi vidis kaj aŭdis en oratoraj turniroj fronte al Han Riner kaj al Sébastien Faure. Sed mi konis lin precipe per liaj verkoj. Jam tre longe mi posedis lian libron "**Pourquoi je suis athée**", kiam lastajare mi entreprenis esperantigi ĝin. Mi komunikis mian tradukon al Suzanne Calas, al kiu ĝi plaĉis, kaj dank'al Kribo ĝi estis eldonita.

Evidente ĝi konvinkos neniun dikredanton, sed al jam konvinkitaj ateistoj ĝi povos alporti kelkajn trafajn argumentojn. Ĉi tie mi citos el la prezenta antaŭparolo de Han Riner :

"Malgraŭ la diferenco de niaj temperamentoj kaj de niaj ritmoj, ĉio, kion mi povus diri pri la temo, ĝin diris Lorulot. Kaj li pliriĉigis min per pasiigaj konsideroj, kiujn mi ne estus eltrovinta.

... "Ne nur en la nomo de sia racio, sed ankaŭ de tuta sia levita koro, de tuta sia indignanta konscienco, de tutaj siaj noble humanaj potencoj Lorulot kondamnas la fikcion Dio."...

Oni ne povus pli ĝuste kaj trafe difini la prototipan ateiston, kiu estis Andreo Lorulot.

VALO

"**Kial mi estas ateisto**", André Lorulot, trad. Valo, 25FF, de nun disponebla ĉe SAT-Broŝurservo, mendkodo: AT.

Restas kelkaj ekzempleroj de "**La Krimej de Dio**", de Sébastien Faure, mendkodo KD, nova prezo : 5FF.



"La Evangelio de la Horo", de P. Berthelot

"Ĉu en la praktiko la homo ne ŝatas kapti la ideojn pere de parabolaj?" demandis sin G. Ledon, kiam li malkovris la tradukon de "La Evangelio de la Horo" de Paŭlo Berthelot fare de Osvaldo Pires de Holanda. Kiujn ideojn? Ja tiujn de Anarkio: "Anarkio estas celo por atingo de memstareco, de memsufiĉeco, de plena sendependeco por ĉiu kaj ĉiuj individuoj en la ĉiutaga aktivado por viveltenado. Eble tiuj diroj aspektas morale kruelaj, bedaŭrinde la homara historio pruvis, ke ne estas alia solvo. Estas ĉio tio kion Berthelot, simplege kaj trans la utopio kaj fantazio montras al ni en **La Evangelio de la Horo**."

Kaj kiu estis tiu Berthelot? Nu, la iama fondinto de "Esperanto", la revuo de UEA! Franca anarkiisto, kiu migris al Brazilio en 1907 kun la celo fondi liberan kolonion.

Malgraŭ la unuavide ne plu laŭmoda verkmaniero, G. Ledon estis frapita de la genieco, de la aktualeco de la verketo, kaj decidis ĝin eldoni. Ĉar li sendis al SAT-Broŝurservo plurajn centojn da ekzempleroj, la broŝurservo decidis enŝovi ĝin en sian serion, aŭtomate liverotan al abonantoj, aŭ mendeblan, novaĵon post novaĵo, de intereso.

"**La Evangelio de la Horo**", 40 paĝoj, mendkodo HO, vendprezo : 10 FF.

"**POR TUTMONDA CIVITISMO - La Necesa Civitisma Edukado**", de Andrée Gaymard-Rollet, esp-igo de Daniel Durand, 80 paĝoj, mendkodo TC, prezo : 20 FF, ĉe SAT-Broŝurservo.

Eldonita dank'al mendo de la Mondcivitanoj kaj pretigita ĝuste okaze de iliaj Tutmondaj Kunsidoj en Turo, aprile de 1990, jen, post "**Unu aŭ Nul**" de Guy Marchand (nun elĉerpita) nova E-broŝuro pri Mondcivitanismo, kiu respondas nepran bezonon de nia epoko.

"La tasko de la nuntempaj edukantoj konsistas ne plu en la transdono de la nuraj ricevataj scioj, sed en la

preparo de la lernantoj kaj disĉiploj, por ke ili solvu problemojn, pri kiuj ni ne konas la ideon mem. Sed por solvi tiujn problemojn - novajn enigmojn - ni devas elpensi simplajn kaj konstantajn kodojn. Tio estas la rolo de la edukado al tutmonda civitismo."

LETERO EL NIA MUELEJO

Kiuj ĵus malkovris L! kaj ties liberdonan formulon, tiujn povas surprizi la tre simila formulo, laŭ kiu estas "aranĝataj" la renkontoj en la muelejo, la denuna sidejo de **Laŭte!** Jam en 1976 estis difinita la maniero, laŭ kiu povas organiziĝi la afero. En 1990 tiu formulo plu validas... Sed, ĉar esp-istoj nun daŭre loĝas surloke, iu ajn interesato povas proponi renkontiĝon je precizaj datoj kaj pri preciza temo. Sufiĉas sendi artikolon al L! Laŭ la ricevitaj respondoj la informoj pri tiu renkontiĝo estas konfirmitaj en la revuo. Ekster tiuj anoncitaj renkontiĝoj, iu ajn povas en iu ajn tago de la jaro viziti la muelejon, anoncante sian alvenon telefone aŭ letere.

En la muelejo mem estas malmulte da loĝebleco (por 4-5 personoj). Tial estas preferinde veni somere kaj restadi en tendoj aŭ ruldomoj. Ekde aprilo komenciĝis la transformado de eksaj kortbirdejoj en "bredejojn por esperantistoj". Fakte, ĉar tiuj konstruaĵoj ne havis sufiĉe fortikan fundamenton, oni simple tute detruis ilin kaj nun rekonstruas pli serioze, kun normalaj pordoj kaj fenestroj kaj pli alta tegmento. Aliflanke, simila nova konstruaĵo aperas kontraŭ la norda muro de la muelejo por ŝirmi novajn necesejojn kaj duŝojn uzeblajn ĉefe de tendumantoj. Ne eblas nun konjekti kiam tiuj ejoj estos ekipitaj kaj uzeblaj, ĉar la afero dependas ĉefe de la disponebleco de metiistoj, sed kiam pretaj, tiuj ejoj ebligas akcepti multe pli da vizitantoj senprobleme.

Meze de majo foriris al ankoraŭ pli sunoplana regiono Ana kaj Ljo, kiuj restadis la tutan vintron en "Cargue Sac". Ni multe bedaŭras ilian foriron. Ili multe helpis por la eldonadoj kaj por la pretigado de hejtligno. Ili ricevu de la muelejanaro plej varmajn dankojn. Al ili ni deziras ĉion bonan kaj feliĉon en la nova, pli vasta nesto.

Kribo

25-jara ĉefino interesiĝas pri francaj kuirarto, historio, pri fremdaj lingvoj, literaturo kaj ŝatus korespondi kun francino aŭ franco (en Esp. aŭ franca). J. ADELTOVÁ, Fučíkova 307, CS-391 02 SEZIMDUD ÚSTÍ.

ĜISDATIĜO PRI "S.M.O.T." (kun ĝeneralaj impresoj pri aktualajoj en Sovetio).

Meze de februaro mi renkontiĝis kun kelkaj anoj de la sovetia laborista unio L.I.L.A. (=Libera Interprofesia Laborista Asocio, kies rusalingva mallongigo estas SMOT). Plejparte mi konversaciis kun Vladimir Anišĉenko kaj Lev Voloŝonski (plue V.A. kaj L.V.). L.V. agas jam en LILA ek de la fondaĵo en Moskvo 1978-jare. Ambaŭ viroj devis pasigi plurajn jarojn en sovetiaj punlaborejoj pro sia politika agado kaj opinioj.

Ĉirkaŭ la mezo de 1987-jaro malkreskis la severo de ŝtataj malhelpaĵoj, do LILA povis eklabori pli-malpli malkaŝe. La ĉefa tasko de LILA estas diskonigadi informojn pri memstaraj laboristaj kaj opoziciaj asocioj en Sovetio. Funkcias ĝi tiel, kvazaŭ kiel lubrikaĵo ene de la libera laborista kaj soci-sanĝiga gruparo ĉi-lande. LILA subtenas la memorganizadon de politikaj grupoj. Ankaŭ ĝi antaŭenigas la principojn de memmastrumado de laborejoj, kiu efikus pere de la laboristoj de ĉiu entrepreno mem.

La Informa Servo de LILA eldonas regule tiel nomatan "Spravoĉnik", kiu estas ampleksa adresaro pri opoziciaj fortoj kaj krome entenas informojn kaj komentojn pri la enlistigitaĵoj. Ĝi similas iome al la internacia anarkiista adresaro "Blacklist". Kvankam LILA ne deklaras sin esti anarkiisma organizaĵo, laŭ mia opinio ĝi impresas kiel anarkiista grupo kaj teorie kaj laŭ ĉiutaga praktiko.

LILA konservas kontakton al diversaj striko-komitatoj, kiuj ekestis dum antaŭnelongaj luktoj, ekz. en la sovetiaj minejaj regionoj Donbas kaj Vorkuta. Laŭdire LILA estis la sola organizaĵo, kiu tuttekste disvastigis la postularon de la strikantaj vorkutaj ministoj en la vintro de 1989-90jj. Ja la politikan enhavon de la postularo (ekz. la postulon, ke la enkonstitucia garantio pri regado de la Komunisma Partio estu forstrekita) fiprezentis aŭ tute ignoris la amas-informilaro sovetia. Malfeliĉe, LILA ne povis

helpi al la strikantaro rekte, ĉar malhelpis grandegaj distancoj inter la strikejoj kaj agadlokoj de LILA, por ne menci provokajojn deflanke de la bolŝevikoj.

Ŝajne multaj strikantoj estis Partianoj do prezentis kaj antaŭenpuŝis sian postularon prefere kadre de Partiaj organoj. V.A. kaj L.V. esprimis esperon, ke tre baldaŭ, eble pli frue ol post jaro, okazos larĝskala senreviĝo pro neefikeco de tiu enPartia laboro. Tiam ankaŭ estos pasinta la nuna elektada aktiveco, kiu tutlande vane konsumas multon da atento. Ili esperas, ke tiam prezentigos taŭga momento por lanĉi sendependan, liberan sindikaton. LILA-on ili konsideras embrio por tiu projekto.

Fakte la formado de novaj sindikatoj estas tre aktuala tendenco en Sovetio. La Konfederacio de Anarki-sindik- atistoj (KAS) ankaŭ konsideras fondadon de sindikato. La ĝis- nunaj konkretaj rezultoj de ĉi-tiu tendenco diferencas larĝ- spektre inter "Socprof" (kiu estas hierarkie organizata, et-reformema) kaj la tutlanda Asocio de kooperaj kaj indiv- iduaj laboristoj. La laste menciita estas tre kuraĝiga nova organizaĵo, opinias V.A. kaj L.V., precipe pro tio, ke ĝi funkcias malhierarkie, ne troe okupiĝas pri deklaraĵoj kaj surpaperaj promesoj, kaj krome estas laŭdire bona interhelpa reto de ĝia membraro. Ĝiaj membroj laboras preskaŭ en ĉiuj partoj de Sovetio, kaj ilia influo sentebles plej forte en la Urala regiono, ekz. en la urbo Sverdlovsko.

Dum nia konversacio leviĝis demando pri la ondo de naciismo, kiu nun afliktas Sovetion. Ekzemple, ni konsideris la sorton de la tri ĉebaltaj landoj (Litovio, Letonio kaj Estonio), kiuj penas sendependiĝi de Sovetio. Opinions V.A. kaj L.V., ke tiu naciisma umado grave malfortigas la laboristan movadon kaj promesas venontecon eĉ pli grizan. Ŝajne la naciismaj sentoj forkonsumas la labor-politikan kaj ekonomian interesojn de la indiĝena loĝantaro. Samtempe timo grandparte turnas la ne-baltan loĝantaron kun plendaj pri helpo al la centra sovetia registaro. Tiu ja deziras kreskigi opozicion al la movadoj por ĉebaltia sendependiĝo. La altaj baltaj komunistoj fariĝis naciistoj, sekurante tiumaniere popularecon kaj ankaŭ siajn postenojn. La enkonduko de novaj lokaj valutoj kaj aliaj radikalaj paŝoj

kapitalismen verŝajne kondukos la laboristaron al ege problemplenaj jaroj, markitaj per alta senlaboreco kaj gal- ope kreskanta inflacio.

V.A. kaj L.V. menciis, ke LILA malhavas bonajn rilatojn al la moskva organizaĵo de KAS. Tamen ĝi pli bone interrilatas kun alilokaj KAS-anoj. V.A. kaj L.V. malfidas je la honesteco de moskvaj KAS-gvidantoj Isaev kaj Ŝubin, kiuj laŭdire estas eksaj aktivistoj de la Komsomol (Kompartia junulara ligo). Ili demandas: ĉu vere la moskvoKASa parto- preno en urba-konsilantaraj elektoj, eĉ se sukcesa, ebligos pli grandan por- kaj per-laboristan influon? Ĉu ĝi almenaŭ plifaciligos kelkajn praktikaĵojn kaj ekz. ebligos liberan aliron al presejoj, luadon de kunsidejoj, ktp.? Eĉ pri ĉi-tio V.A. kaj L.V. esprimis profundan dubon.

"Pli grave kaj efike estas ke ni restu sendependaj kaj laboru ĉe-popole ol implikiĝi en la senprofitaj intrigoj kaj fifaroj de la parlamentoj, kiujn ankoraŭ regas komunistoj."

Mia ĝenerala impresio estas la jena: ke LILA estas organizaĵo malgranda, kiun tamen konsistigas aktivistoj laboremaj kaj aktuale-pensantaj. Ĝin ŝajne ne interesas elekt- adaj distraĵoj, nek naciisma fervoro, nek la Gorbaĉov-adorado de la amas-komunikilaro preskaŭ-tutmonde. Dum la pasintaj jaroj kelkaj LILA-anoj forlasis Sovetion. Sekve, ĉi-tie mi donas adreson de LILA-ano, kiu retenas kontakton al la Informa Servo de LILA. Eble estos pli facile kontakti ŝin ol la gekamaradojn en Sovetio mem...

A.V. Jakorjeva

Oskar-Maria-Graf-Ring 46

D-8000 München

F.R.G. tel.: (089) 637-70-50

LILA, samkiel ĉiuj opoziciaj organizaĵoj en Sovetio, urĝe bezonas materian helpon. Nuntempe plej akre mankas al LILA karbopolvo por la fotokopiilo. Necesas, ke la polvo estu de la speco "Rank Xerox 3100, speco H", kiu ne estas havebla en Sovetio. Treege gravas la havigo de precize ĉi tiu aĵo, ĉar LILA ja precipe estas porinforma organizaĵo per-presaja. Kompreneble, estus bonvenaj aliaj skrib- respektive pres- teknikaj iloj, internaciaj valutoj (DM), anarkiismaj pres-

Vojaĝi? Jes, sed kiel?

Vi lernis Esperanton por intimiĝi kun aliaj mondanoj. Malfeliĉe, vi ne scias kiel tion realigi.

Ekster la kongresoj, vi ne scias kion fari por ligi firmajn kontaktojn kun alilandaj samideanojn.

L'AMIKECA RETO estas servo, kies celo estas permesi ĉiaspecajn amikecajn rilatojn. Ĝi celas fundajn neordinarajn vizitojn, nekutimajn aktivecojn aŭ diskutojn.

L'AMIKECA RETO iras tien, kien la turistoj ne iras mem, ĉar mankas al ili la lingvo de la amikeco, la Zamenhofan...

Vi aĉetu la ĉi-jaran gvidlibron per 30 FF aŭ ekvivalento, aŭ per ia ajn rimedo...

Postkonto: Rollin; N° 1544 95 V; ĝircentro: La Source (F)
Adreso: Amikeca Reto; 63 rue de la République;
à Chargé: F-37530-AMBOISE (Francio)

La Amikeca Reto

Aperis la ĉi-jara eldono de la Amikeca Reto, kiu validos dum 2 jaroj. Ĝi entenas 268 adresojn en 33 landoj kaj kompreneble ofertas multajn diversajn proponojn por interese profiti vojaĝon.

ATENTU!

* Ĉi-jare, pro altiĝo de la diversaj elspezoj, la vendo-prezo ne plu entenas la afrankon. Vendoprezo : 30 FF plus 7,50 FF por la afranko, do entute : 37,50 FF

* Ni rememorigas al niaj membroj, ke ili devas, laŭ la nuntempa regulo, aĉeti kroman ekzempleron por amiko aŭ korespondanto.

ALVOKO

Por la venonta kongreso de SAT-Amikaro en Ambuazo, la OKK antaŭvidas multajn diversajn eblecojn. Ni plie studos ĉiujn sugestojn por efektiviĝi petardan kongreson. Konkrete ni nuntempe urĝe serĉas :

* kursogvidantojn por instrui komencantojn dum la tri tagoj de Pasko 1991 (fakte 2 kaj duono).

* interesatajn kamaradojn por gvidi grupon dum ekskursoj per montarbiciklo (VVT) aŭ kanuo sur rivero Ĉero.

* trafe profiti de 2 tiamaj eventoj : la loka vinfero kaj eventuala "aprila fiŝo" de la unua de aprilo.

* vartistojn por la komforto de la infanoj dum aliaj esperantistoj prezentos librojn, kanzonojn, dancojn ktp...

* diversajn kunlaborojn pri nia kongrestemo "Luaro, protektenda sovaĝa rivero, ne estas limo, sed kultura kerno."

Kunlaborojn pri ero de tiu titolo aŭ pri riverprotektado ĝenerale. Ni varme akceptus prelegantojn aŭ informantojn pri poluado aŭ protektado de riveroj el aliaj mondpartoj. Ni deziras ricevi rektajn informojn dum la ekologiistoj ricevas nur onidirojn.

* Ni esperas reliefigi la gravan alporton de regionaj pensuloj kiel i.a. Descartes por nia E-afero kaj aparte Malkovri grafon de Volney (1757-1820)

Ĉiujn helppropojn oni sendu al :
Gerardo ROLLIN, 63 rue de la République
Chargé, F 37530 AMBOISE

ASISTI

La unuan de aŭg.'89, okaze de la U.K. en Brighton, fondiĝis nova E-asocio, fine de la kutima Inter-Religia Kunveno Esperantista : temas pri la Asocio de Studado Internacia pri Spiritaj kaj Teologiaj Instruoj, kiu celas pli bonan interreligian komprenon, ĉefe per disvastigo de spiritaj valoroj entenataj en ĉiuj religioj de la mondo.

Jam aperis kvin numeroj de ties bulteno ASISTILO (Ligila Organo de ASISTI), kiu bonvenigas ĉiujn kontribuantojn (ĉefe universitatnivelaĵajn studojn).

La ideo pri ASISTI naskiĝis (i.a.) pro sentita manko de neŭtralaj kaj sciencaj studoj e-lingvaj, pri religioj kaj gravaj spiritaj "fluoj" (ekz-e laŭ kompara vidpunkto).

Sed ŝajnas necesa ankaŭ kunlaborado de reprezentantoj de diversaj nunaj religiaj movadoj, kiuj povos alporti kiel specifan kontribuon la ateston de fideluloj persone partoprenantaj tiujn spiritajn vojojn.

ASISTILO deziras samtempe fariĝi forumo por interreligia dialogo inter ĉiuj E-parolantoj - anoj de iu ajn kredo kaj nekredantoj - pri ĉiuj spiritaj temoj ; la nura kondiĉo estas plej grandaj toleremo kaj respekto al opinioj de nesamkredantoj.

La aliĝo simpla al ASISTI por 1990 (sen bulteno sed kun adresaro) estas 10 FF (aŭ 3 irpk), kaj la jarabono al la bulteno 35 FF (= 6 \$); oni povas ankaŭ peti senpagan provokzempleron. Kontakto (ĉe la sekretario) : Ch. LAVARENNE, "Les Marguillans", Lignane, F-13540 PUYRICARD. (Poŝtkonto : 6 491 49 L Marseille).

Ce SAT-broŝurservo

- * elĉerpiĝis : AR, KF, NE, PF, VI.
- * novaj prezoj : ES 15, ET 15, KD 5, KI 15, SJ 15.
- * aperis 2 novaj broŝuroj :
vd. sur p. 60-61

aĵoj, ktp. Vi povas kontakti la Informan Servon de LILA
ĉe la ĉi-sekva adreso:

USSR
142784 Moskovskaia oblast
Leninski raion
pos. Moskovski dom. 32, kv. 73
KORZININA OLGA
Tel.: 439-97-48.

Volo Fjordano (Will Firth, aŭstralia anarkiisto)

Moskvo, marto 1990j.

E-renkonto en Florac (Lozère, Francio)

de la 2a ĝis la 9a de julio 1990

Promenadi, piedmigradi kaj samtempe
praktiki esperanton.

La E-grupo en EYSINES (Ĝirondio, F)
organizas por e-istoj kaj nee-istoj
promenadojn kaj piedmigradojn el
la etapkuŝejo de FLORAC (Lozero).
Ni marŝados tra Cevenoj, nacia par-
ko. Ni antaŭvidas du grupetojn -unu
el promenantoj, la alia el piedmi-
grantoj kapablaj marŝadi 5-6 horojn
tage (18-20 km).

Vespere okazos animadoj:

- konversacioj: interŝanĝoj por
la esperantistoj.

- ludoj, kantoj, projekciadoj ktp.

La partoprenantoj mem animos la
vesperojn. Ne forgesu viajn muzika-
ilojn, diapozitivojn ktp.

Dormosako aŭ lanugaĵo estas deviga,
ankaŭ dorssaketo por la pikniko.

Aliĝilon petu de: Ginette GABILLON

32 rue Renault, F 33200 BORDEAUX

SUNRADIOJ

... estas la nomo de ĵus aperinta,
komuna E-bulteno de diversaj aso-
cioj aktivantaj por ekologio en E-
medio (i.a. AVE, AVUE, EKES, pri
kiuj Laŭte jam informis). Ses-paĝa,
tiu nova bulteno arigas kaj diskon-
igas multajn utilajn informojn. Ĝi
estas provo, sed la projekto estas
aperigi 5-6 numerojn jare, do ĉiuj

proponoj pri kullaboro estas bonvenaj.

Skribi al: Ekologio-Esperanto,
38 rue Jean Moulin
F-33220 STE FOY LA GRANDE
(Tel: 57 46 47 28)

ATEISMO

organo de Ateista Tutmonda Esperanto-
Organizo, estas eldonata trifoje jare.
Abono: 8 \$ rekte al John B. Massen,
1525-A Day Avenue, San Mateo,
CA 94403-1608, USA. aŭ pere de UEA:
konto ATEO-Y.

La riĉenhava numero de januaro aper-
igas ankaŭ anoncon pri Laŭte. Al ĝi
ni volonte recipokas, rekomendante
al ateistoj de L! subteni tiun sorge
presitan revueton.

SEM pluseMas...

Studgrupo Esperanta kaj Matematika,
ĉe GBEGLO Koffi, B.P. 13169, Lomé,
TOGO, plu bonvenigas helpojn, por ke
ĝi plusemu en la nigra kontinento:

* libroj matematikaj franclingvaj
por la 3a klaso de kolegioj
* kajeroj, skribiloj, kretoj...

* libroj "Le nouveau cours d'Esp."
de TRIOLLE kaj LUDWIG

* (poŝ)vortaroj franca/E aŭ/kaj nur
Esperanta.

Aliaj E-aĵoj (glumarkoj, insignoj,
revuoj, afiŝoj, turismaj prospektoj,
ĉefe diapozitivoj pri la E-movado)
estas bonvenaj.

268 adresoj
en 33 landoj



alia Turismo al alia Mondo

Ĉi-somere, 3 diversaj renkontoj en Beauville

* De la 21-a ĝis la 29-a de julio :

RENKONTIĜO DE INFANOJ

Tiu renkontiĝo celas kunvivi geknabojn en E-kadro, donante al ili oportunon eklerni kaj ekuzi E-on en la ĉiutagaj okupoj. Venos infanoj 6-ĝis 10-jaraj el Nimo, Mont-de-Marsan, eble ankaŭ el eksterlando, kun akompano de almenaŭ 3 prizorgantoj. Se plaĉos al vi kontribui al la animado de tiu restado, kunprenu vian tendon kaj ek!... al la Muelejo! Estos interese miksi la generaciojn en samtempaj kunlernado kaj kundistriĝo.

* Vi ĝuas la E-literaturon. Vi ŝatus komuniki vian plezuron al aliaj. Vi pretas laŭtlegi...

Do, eble interese vin nia projekto realigi son-bendon, poste multobligotan kaj disponigotan por ĉies uzo aŭ plezuro je malalta prezo.

Jen du eblecoj :

1) Ni elektos temon kaj provos kolekti erojn prozajn, poeziajn, teatrajn, rilate al la elektita temo, ekzemple : bestoj, amo, virinoj...

2) Ni elektos verkmanieron : rakonte, fabele, novele... kaj registros specimenojn plejeble variajn pri tiu verkmaniero.

Por variigi la aŭskultadon, estus agrable enmeti muzikinterludojn inter la tekstojn.

Se taŭgos por vi la elektita periodo (de la 30a de julio ĝis la 7a de aŭgusto) ne hezitu! Kaj ne forgesu kunpreni ideojn, tekstojn kaj muzikojn.

* FRANCISKA INVITAS...

"Mi estas komencantino. Mi ĵus vizitis la muelejon. Interesus min renkonti tie aliajn E-istojn, komencantajn aŭ pli lertajn, por plu lerni kaj pli flue utiligi la lingvon en agrabla, amika etoso. Mi ferios de la 1-a ĝis la 20-a de aŭgusto. Al kiu plaĉos mia propono? Ĝis baldaŭ!"

Franciska.

Mesaĝo de la muelejanoj : Jen trafa ideo! Ni povos do dum tiu periodo aranĝi laŭbezzone kursojn diversgradajn, sed pli speciale por komencantoj dezirantaj prepari la unuagradan ekzamenon.